

# Australian Esperantist

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

VOL. 1. N-RO. 1.

MAJO, 1908.

PREZO 3 PENCOJ.

## ANTAŬPAROLO.

Al multaj, eble al la plimulto da niaj Australiaj esperantistaj amikoj, ŝajnos ankoraŭ tro frue atenci la fondigon de Aŭstralia gazeto pritraktanta la zamenhofan lingvon; sed konsiderinte, ni devas konkludi ke tia gazeto fariĝos tre utila por la afero, helpante al komencantoj, kunligante la samideanojn de tiu ĉi vasta kontinento, kaj donante al entuziasmuloj la okazon vidi en presita formo siajn unuajn provojn je aŭtoreco. La gazeto tute dependos de la helpo de samideanoj. Ĝiaj paĝoj estos malfermitaj por diskutoj pri ĉiuj aferoj interesaj por esperantistoj. Demandoj pri la gramatiko, novaj vortoj, k. t. p., estos responditaj, kiel eble plej korekte. Ĉiuj kiuj deziras la antaŭeniradon de la esperanta afero devas helpi tian propagandilon per abonpagoj, kaj ankaŭ per artikoloj, amuzaj skizoj, versaĵoj, k. t. p., ĉu originalaj aŭ ne. Tiu ĉi malferma numero nur celas la varbadon de kiel eble plej multe da subtenantoj, kaj oni esperas ke ĉiu kiuj ĝin ricevis, ne estos kontenta je la propra trailegado, sed sciigos ĉiujn esperantistajn amikojn pri la nova entrepreno. La redakcio havas je sia dispono multe da bona esperanta literaturo, kaj la legontoj de la gazeto povas certigi ke ĉiu numero enhavas ekzemplon de la plej bone esperanta stilo. Do, ĉiuj kiuj favoras la ideon, bonvolu respondi, kaj sendi ankaŭ iajn proponetojn pri la bona administrado de la gazeto. La supersignitaj preslitteroj estas ricevitaj de Sydney, kie la matricoj estas gravuritaj laŭ nia speciala mendo, kaj estas la solaj nuutempe en Aŭstralio. Ĉiuj komunikadoj devas esti sendataj al la Redaktoro.

To many, perhaps to the majority of our Australian esperantist friends, it will seem too early to attempt the establishment of an Australian gazette, dealing with the language of Zamenhof; but upon consideration we must conclude that such a gazette will become very advantageous to the affair, helping beginners, uniting the fellow-thinkers of this vast continent, and giving to enthusiasts the opportunity of seeing in print their first attempts at authorship. The gazette will entirely depend upon the assistance of comrades. Its pages will be open for discussion about all matters interesting to Esperantists. Questions concerning the grammar, new words, etc., will be answered as correctly as possible. All who desire the advancement of the Esperanto movement should help such an instrument of propaganda, by subscriptions, and also by articles, amusing sketches, verses, etc., whether original or not. This opening number only aims at the enrolment of as many supporters as possible, and it is hoped that each one who receives it will not be content with reading it personally, but will inform all his Esperantist friends about the new enterprise. The Editorial Department has much good Esperanto literature at its disposal, and the readers of the Gazette can be sure that each number will contain an example of the best Esperanto style. All, then, who favour the idea, kindly reply, and send any suggestions for the good management of the Gazette. The accented type has been obtained from Sydney, where the matrices have been engraved to our special order, and are the only ones at present in Australia. All communications should be sent to the Editor.

## ESPERANTISTA ŜTATO.

Se la projekto kiun ĵus ellaboris kelke da entuziasmaj francaj, germanaj kaj belgaj esperantistoj, povos esti efektiviĝita, la venontaj unu-du jaroj vidos la naskiĝon de sendependa esperanta ŝtato en Eŭropo.

Oni proponas peti de la registaroj de Francujo, Germanujo, Belgujo kaj Holandujo la bonvolon kaj permeson fondi la novan ŝtaton.

La ŝtato estos sur neŭtrala landstrio kiu kuŝas ĉe la landlimo inter Germanujo, Belgujo kaj Holandujo, ĉirkaŭ kvin mejlojn malproksime de Aix-la-Chapelle. Tiu ĉi teritorio, nomata Moresnet, sidas en bela valo, posedas malgrandan "kasinon," enhavas neŭtralan 3000-nombran loĝantaron, duone germanan, kaj duone belgan, kaj estas trairata de elektraj tramveturiloj de Aix-la-Chapelle, kaj la belga flanko de la landlimo.

La organizanto kaj iniciatoro de la nova projekto estas la konata franca esperantisto, Profesoro Roy, kiu certigas ke la klaso da homoj la plej interesata pri la disvastigado de lingvo internacia, estas la komerco-vojaĝistoj. Pro tio, Sro. Roy, kaj liaj kunuloj jam proponis, la fondon de sindikato da internaciaj komerco-vojaĝistoj kiu havos sian ĉefoficejon en la nova ŝtato. Oni proponas, se konsentos la germana kaj belga registaroj, fari el la ŝtateto libertempan kunvenejon, kiel eble plej ĉarman por ĉiuj komerco-vojaĝistoj, kaj precipe la esperantistoj. Estos altranga kaj plene provizita komerca klubo, kaj fako por la protektado de esperantaj aferoj. Oni fondos esperantan kolecion, kaj Esperanto estos la oficiala lingvo de la ŝtato. Ekzistos: eniaj impostoj, kaj la ŝtatspezon, kiu estos kiel eble plej malgranda, oni pagos per kotizajoj de la tutmonda esperantistaro. La projekto enhavas esperantan parlamenton, kiu kunvenos de tempo al tempo por konsiliĝi pri la ŝtataferoj. La estro de la ŝtato, kiu estos respublika, estos la tiama prezidanto de la internacia esperanta akademio. Oni ne permesos al la ŝtato fariĝi financa aŭ profitema komunumaro, kvankam ĝi estos administrata laŭ komercaj principoj.

## ELTIRAĴO EL "LA FUNDO DE L'MIZERO."

Dro. Bein, pli bone konata de la esperantistaro per sia pseŭdonomo "Kabe," estas varsovia kuracisto, kaj fariĝis fama pro siaj elegantaj tradukoj el la pola literaturo. La eltiraĵo malsupre presita estas el tre kortuŝanta rakonto de Vaclav Sieroŝevski, kiu priskribas leprulan boĝejon en la siberia "tajga" (Virga siberia arbaro.) tradukita de "Kabe."

En la "tajga" de l'malproksima nordo misteraj lokoj ekzistas, pri kiuj la enlanduloj nevolonte parolas, eviteme respondante la demandojn: "tien nur la vento alflugas kaj la migrantaj birdoj sidigas dum sia flugo al la maro." Tie la akvoj reĝas; oni ĉie vidas ilin palajn kaj brilantajn, kaj la ĉielo, pendas super ili pala pro ilia rebrilo. Sur la bluaj vastaj vejnoj de akvumita tero serpentas kaprice, kiel polipaj palpiloj. Sur la plataj bedoj de l'seka tero staras arbaroj maldensaj, kvazaŭ okulharoj; jen malgranda monteto aperas; jen oni trovas rivereton, kiu kunigas du akvujojn kaj per sia murmureto rompas la unutonecon de la starantaj akvoj. La okulo eraras en la perla spaco kaj ripozas nur sur la malklaraj desegnaĵoj de l'malproksimaj insuloj kaj promontoroj.

Mirinde malgaja lando. \*

## ADVICE TO BEGINNERS.

Although Esperanto is very easy, the student must not fancy that there is any Royal Road to proficiency. The language must be mastered systematically, and for English-speaking students, the very complete and compact text-book by Dr. O'Connor is strongly recommended. By the time the student has thoroughly mastered this little manual, he can commence to read with ease some of the simpler work in Esperanto. Westcott's translation of Dickens's "Christmas Carol" is strongly recommended, as the style is graceful and simple, and has been approved of by Dr. Zamenhof. The English version can be used as a key. Although O'Connor's text-book has a dictionary at the end, it is hardly comprehensive

enough for general reading, and the student will do well to obtain the Esperanto-English dictionary by Motteau, and the English-Esperanto dictionary by O'Connor and Hayes. Up till now it is rather disappointing to find how few books in Esperanto are stocked by the booksellers in Australia, but as the demand increases, no doubt they will see the wisdom of ordering the latest works as they come out. Lastly we may remark that as there is no attempt to make money by the sale of Esperanto books, the price is extremely small, as compared with works in other foreign languages.

#### ESPERANTO IN AUSTRALIA.

It is the experience of most Esperantists in Australia that the average person is totally uninterested in the subject of an auxiliary language. "It is all very well," he will say, "for Europeans who are jostling together in France, Germany, Switzerland, etc., and constantly meeting and doing business with persons speaking different languages: an auxiliary language is the very thing for them. But here in Australia, where we all speak English, what earthly benefit can it be for us to study Esperanto?" We freely admit that this is an attitude quite natural for an Australian to assume, if he is only concerned about business, and takes no interest in anything which does not tend to increase his income. But for those who find enjoyment in pursuits outside of mere sordid business matters, we purpose mentioning a few of the claims which Esperanto has on the average Australian native.

It must be confessed that, as a whole, the youth of Australia is sadly unintellectual. From the day when the compulsory schooling is over, a large number of young people never pursue any course of study at all, and when their hours of work are over, their sole subject of conversation is some form of sport. Far be it from us to decry Athletics, which is most necessary for the young men and women of Australia; but, just as in all healthful games, the exercise of the muscles increases their development, so intellectual exercise cannot fail to benefit the mind. It is admitted

that the study of foreign languages is one of the most beneficial forms of intellectual exercise, but the average young man or woman, working for a living, has not sufficient leisure time for the thorough mastery of any modern national language. Here it is that Esperanto comes in. Let anyone apply himself in his leisure moments to the study of this wonderfully simple language, and in less than a month he will have a good grasp of it, though of course, as in other languages, as time goes on, his style and fluency will improve.

But, even at this early stage, he will have at his disposal the literature of all countries; for in every country energetic Esperantists are translating the best of their literature into the new language, and many works are now being written directly in Esperanto. Through the medium of the now numerous Esperanto journals and magazines he can read what is going on in the scientific, literary and sporting circles of the world.

Again, even if we never intend to leave Australia, it is quite possible that we may meet foreigners here who, as is the case with so many thousands of Europeans nowadays, are only acquainted with their own language and Esperanto, it would be very gratifying to be able to greet them in the latter harmonious tongue. Besides, some of us at least hope at some period of our life to visit Europe, and now that nearly every important town has its Esperanto consulate, a Britisher need never be afraid of encountering any difficulty on the continent from his ignorance of French or German.

In conclusion, let us point out one other advantage that Esperanto has. It is a strange but undeniable fact that there exists a kind of natural freemasonry among Esperantists, so that untrammelled by any rules or obligations, each regards the other as a fellow-member of the great human family, whose complete happiness and harmony will only be thoroughly attained when its members acquire the power of mutual intelligibility, and this can only be gained by the use of an international auxiliary language such as Esperanto.

## ELTIRAĴO EL HAMLETO.

Akto I. Sceno 3.

La Konsilo de Polonio al Laerto.

Kaj memoru

Regulojn, kiujn mi al vi instruis :  
 Ne ĉian penson metu sur la langon,  
 Ne donu tuj al ĉia penso faron.  
 Afabla estu, sed ne tro kredema.  
 Al la amiko saĝe elektita  
 Kunforĝu vin en fera fideleco,  
 Sed gardu vian manon de la premo  
 De ĉiu renkontota bona frato.  
 Vi gardu vin de ĉia malpacigo ;  
 Se vi ĝin ne evitos,—tiam agu  
 Fortike, ke la malamik vin timu.  
 Al ĉiu servu per orelo via,  
 Sed ne al ĉiu servu per la buŝo.  
 Konsilojn ĉiam prenu vi de ĉiu,  
 Sed propran juĝon en la kapo tenu  
 Laŭ via mon' mezuru vian veston,  
 Sed ĉio estu takta kaj konvena ;  
 Vin vestu bone, sed ne kiel dando :  
 Laŭ vest' ekkonas oni ofte viron,  
 La homoj altastataj en Francujo  
 En tiu punkto estas tre zorgemaj.  
 Ne prenu prunte kaj ne prunte donu ;  
 Per pruntedono ofte oni perdas  
 Krom sia havo ankaŭ la amikon,  
 Kaj pruntepren' kondukas al ruino  
 De la mastrajo. Antaŭ ĉio estu  
 Fidela al vi mem,—de tio sekvos,  
 Ke vi ne estos ankaŭ malfidela  
 Al la aliaj homoj. Nun adiaŭ,  
 Kaj mia beno vin akompanadu !

Tradukita de Dro. L. L. Zamenhof.

## ANEKDOTOJ.

INTER BOPATROJ.

“Ĉu vi estas kontenta je via nova bofilo ?”

“Ho, ne forte, mi faris tre malbonan elekton”

“Per kio ?”

“Vidu, mia kara, li ne povas trinki, li ne scias ludi kartojn, kaj al ĉio, li havas ankoraŭ mirindan talenton de parolado.”

“Kion do vi volas ? Mi vin ne komprenas ! Tio ĉi estas ja ĉiuj nur tre bonaj ecoj !”

“Sed vidu : li ne povas trinki kaj trinkas, li ne scias ludi kartojn kaj ludas ; se li ne estus granda parolanto, tiam mi sola scius, ke li estas malsaĝa,—nun la tuta mondo tion ĉi scias.”

El la Krestomatío.

## KIU ESTAS LA ESTRO ?

Unu farmisto havis filon kiu intencis baldaŭ edziĝi. Unu tagon tiu ĉi demandis la patron, “Kiu estas la estro, edzo aŭ edzino ?” La patro respondis, “Iru, jungu la ses ĉevalojn al la sargveturilo, kaj enmetu en ĝin la tutan kokidaron.” Veturigu laŭ la vojo, kaj ĉe ĉiu domo, haltu, kaj faru la demandon, “Kiu estas la estro, edzo aŭ edzino ? Se oni respondos, ‘la edzino,’ donacu unu kokidon, sed se la respondo estos ‘la edzo, donacu unu el la ĉevalojn.” La filo obeis, kaj ekiris laŭ la vojo. Li vizitis multe da domoj, sed ĉiufoje oni respondis al lia demando, “la edzino,” ĝis li preskaŭ fordonacis ĉiujn kokidojn, sed nenium ĉevalon. Fine li alvenis al farmdomo, kaj faris la kutiman demandon. La ruĝvizaĝa farmisto kolere respondis, “Kompreneble mi estas la estro.” “Bonvolu akcepti unu el tiuj ĉevaloj,” diris la junulo. “Dankon,” diris la farmisto, “mi prenos tiun brunan ĉevalon.” Dume la edzino alvenis, kaj nun ŝi diris, “Mi preferas la grizan.” Ili foriris, kaj kune disputis. Post kelkaj minutoj la farmisto revenis kaj diris, “Mi nun decidis preni la grizan.” “Ne, ne” diris la junulo, “vi devas preni kokidon.”

Esp. 16479<sup>2</sup>

## RUZA IRLANDANO.

Unu Irlandano, kiu komencis la fotografarton, eniris butikon de ĥemisto, por aĉeti boteleton, en kiu li povos miksi siajn solvajojn. Ekvidinte tian, kian li bezonis, li demandis de la ĥemisto la koston. “Nu,” diris la ĥemisto, “ĝi kostas du pencojn malplena, sed se vi deziras ke mi enmetu ion, mi ne taksos la boteleton.” “Dankon,” diris Patĉjo, “enmetu do korkon en ĝin.”

Printed and published by R. Dossor,  
 for the Benalla Esperanto Club,  
 Bridge Street, Benalla, in the  
 State of Victoria.

# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. I. N-RO. 2.

JUNIO, 1908.

PREZO 3 PENCOJ.

## AL NIAJ LEGANTOJ.

Malgraŭ la iom malvarmeta akcepto de nia malferma numero, ni decidis daŭrigi la aferon ankoraŭ kelkatempe, esperante ke post ne longe la dormanta entuziasmo de niaj esperantistaj geamikoj ekvekiĝos, kaj la ĵurnalo fariĝos pli kaj pli interesa kaj subteninda. Tamen ni devas konfesi ke la malgranda procento da respondoj tre surprizis kaj malkontentigis nin.

En la nuna eldono ni presas iom da interesa korespondado pri la Afero, kaj ankaŭ laŭpromese eltiraĵojn el "La Robistoj," de Schiller, tradukita de Dro. Zamenhof. Kelkaj amuzaj anekdotoj ankaŭ trovas lokon, kaj iom da poezio. Ekvekiĝu do, geverkistoj de la estonto! Faru la unuan provon. Ne ĝenu vin pri eraroj. La plej spertaj esperantistoj ne estas perfektaj. Sendu do iajn legindaĵojn, ĉu esperante aŭ angle, se tiuj nur estas spritaj kaj interesaj. Memoru ankaŭ, komentantoj, ke ni tre volonte respondos al ĉiuj demandoj pri la gramatiko, kaj konsiloj pri la plej bonaj verkoj taŭgaj por legado en la komenco.

Ni decidis malakcepti, nuntempe, jar- aŭ duonjarabonpagojn, kaj ni deziras ke ĉiuj kiuj ricevos la ĵurnalon bonvole sendu poŝtmarke nur la prezon de la ekzempleroj ĝis tiam ricevitaj. Ni tiel povos koni tiujn kiuj vere bondeziras la entreprenon.

## KELKAJ MANKSAJ PROVERBOJ.

La tempo estas ŝipo kiu neniam ankras.

Ne maŭ viajn pilolojn.

Amu vian najbaron kiel vin mem, sed ne detruu vian palisaron.

Estas facile trovi kaŭzojn pro kiuj alioj devus pacienciĝi.

Esp. 17185.

## TO OUR READERS.

Notwithstanding the somewhat cool reception of our opening number, we have decided to still continue the affair for a time, hoping that after a while the dormant enthusiasm of our Esperanto friends will awaken, and the journal will become more and more interesting and worthy of support. Nevertheless we must confess that the small percentage of responses surprised and disappointed us greatly.

In the present edition we print some interesting correspondence about the Affair, and also, according to promise, an extract from "The Robbers," by Schiller, translated by Dr. Zamenhof. Some amusing anecdotes also find a place, and also a little poetry. Wake up then, writers of the future! Make the first effort. Never mind mistakes. The most experienced Esperantists are not perfect. Send, then, any readable matter whether in Esperanto or English, provided it is witty and interesting. Remember also, beginners, that we shall be very willing to answer all questions about the grammar, and give advice about the best works suitable for reading at the commencement. We have decided to refuse, at present, yearly or halfyearly subscriptions, and we wish that all who receive the journal will send in stamps only the price of the copies received up to that time. We shall thus be able to know those who really wish well to the undertaking.

Estas ja vere tiel en nia Esperanta regno, kiel ankaŭ en la ĉiela, ke "neeble estas eniri en ĝin, escepte etainfane."

Ei ĉiuj plezuroj Esperantisto ĝuas la plej ŝatindan, nome stariĝadi sur la altaĵoj de la Vero.

El Bejkon (Bacon).

## EL TIRAJO EL "LA RABISTOJ."

Dramo de Schiller.

EL GERMANA LINGVO TRADUKITA.

DE DRO. L. L. ZAMENHOF.

FRANCISKO.—Mi scias tre bone, ke eternecon esperas tiu, al kiu ĉi tie estis ne tre gaje; sed li estos malbele trompita. Mi ofte legis, ke nia esenco estas sole ludo de la sango, kaj kun la lasta guto de sango forfluas ankaŭ la spirito kaj la penso. La spirito partoprenas en ĉiuj malfortajoj de la korpo, kiel do ĝi povus ne forperei ĉe la detruigo de la korpo? ne forvaporigi ĉe ĝia putriĝo? Se unu guto da akvo trafos en vian cerbon, via vivo tuj faros halton, kiu prezentos la limon de neestado, kaj la daŭro de tiu stato estas la morto. Sentado estas svingigado de kelkaj kordoj, kaj la rompita fortepiano plu ne sonas. Se mi lasus fordetrui miajn sep kastelojn, se mi rompus ĉi tiun Veneron, tiam la simetrio kaj beleco ĉesus ekzisti. Vidu, tio ĉi estas via senmorta animo!

MOSER.—Tio ĉi estas la filozofio de via malespero. Sed via propra koro, kiu ĉe tiu ĉi argumentado kun timega tremado frapas viajn ripojn, kulpigas vin pri mensogado. Tiun ĉi araneajon da sistemoj disŝiras la sola vorto: vi devas morti! Mi vokas vin, kaj tio ĉi estos la provo: se ankaŭ en la horo de la morto vi staros fortike, se viaj principoj ankaŭ tiam vin ne forlasos, tiam vi gajnos; se en la horo de la morto atakos vin eĉ la plej malgranda tremo, tiam ve al vi! vi trompiĝis.

FRANCISKO konfuzite.—Se en la horo de la morto min atakos tremo?

MOSER.—Mi vidis jam multe da tiaj mizeruloj, kiuj ĝis tiu momento kie forteguloj staris kontraŭ la vero; sed en la momento de la morto mem forflugas la iluzio. Mi staros ĉe via lito, kiam vi estos mortanta—mi tiel forte dezirus vidi, kiel tirano finas la vivon—mi tiam staros apude kaj mi fikse rigardos al vi en la okulojn, kiam la kuracisto ekkaptos vian malvarman kaj malsekan manon kaj apenaŭ trovos la formortantan pulson kaj ekrigardos kaj kun la terura ekmovado de

la ŝultro diros al vi: homa helpo estas vana! Gardu vin tiam, ho gardu vin, ke vi tiam ne havu la mienon de Rikardo aŭ Nerono!

FRANCISKO.—Ne, ne!

MOSER.—Eĉ tiu ĉi "ne" fariĝos tiam plorkrianta "jes" Interna tribunalo, kiun vi neniam provos subaĉeti per skeptika saĝumado, tiam vekigo kaj faros juĝon kontraŭ vi. Sed ĝi estos vekigo, simila al la vekigo de homo vive enterigita en la ventro de la tombejo; ĝi estos terura sento, simila al la sento de memmortiganto, kiam li faris jam la mortigan baton kaj pentas; ĝi estos fulmo, kiu per unu fojo flame eklumigos la noktomezon de via vivo; ĝi estos nur unu ekrigardo; kaj se vi tiam ankoraŭ staros fortike, tiam mi diros, ke vi gajnis!

FRANCISKO, maltrankvile paŝante tra la ĉambro tien kaj reen.—Paŝtraĉo babilado, paŝtraĉo babilado!

MOSER.—Tiam la unuan fojon la glavoj de eterneco tratranĉos vian animon, kaj tiam la unuan fojon tro malfrue. La penso "Dio" vekas teruran najbaron, kies nomo estas "juĝanto." Vidu, Moor, la vivon de miloj vi havas sur la pinto de via fingro, kaj el milo vi naŭcent-naŭdek-naŭ ĵetis en mizeron. Por esti Nerono, al vi mankas nur la Roma regno, kaj nur Peruo mankas al vi, por esti Pizarro. Nu, ĉu vi pensas, ke Dio permesos, ke unu sola homo en lia mondo regu kiel furiozulo kaj renversu ĉion la supron malsupren? Ĉu vi opinias, ke tiuj naŭcent-naŭdek-naŭ ekzistas nur, por ke vi ilin ruinigu, nur por ke ili estu la pupoj de via satana ludo? Ho, ne pensu ĉi tion! Ĉiun minuton, kiun vi al ili mortigis, ĉiun ĝojon, kiun vi al ili venenis, ĉiun perfektecon, kiun vi al ili baris, li iam ekpostulos de vi, kaj se vi tiam povos respondi, Moor, tiam mi diros, ke vi gajnis.

FRANCISKO.—Nenion plu, eĉ ne unu vorton plu. Ĉu vi deziras, ke mi estu servanto de viaj hipohondriaj kapricoj?

MOSER.—Vidu, la sorto de la homoj troviĝas en terure bela egalpezo. Se la pesiltaso malleviĝas en tiu ĉi vivo, ĝi alte levigo en tiu vivo; se ĝi levigo en ĉi tiu, ĝi en tiu falos ĝis la tero. Sed kio ĉi tie estis pasonta triumfo, fariĝos tie eterna, senfina malespero.

## EL "LA NEGOCISTO DE VENEZIO."

Parolado de Portio. Akto IV.  
Sceno 1.

La kompleteco estas nestreĉita,  
Ĝi gutas kiel pluvo el Ĉielo  
Malsupren sur la teron, ĝi benita  
Duoble estas, benas la donanton,  
Kaj ankaŭ la prenanton; plej potenco  
En potenceco, ĝi konvenas reĝon  
Entronigita pli ol lia krono.  
Elmontras lia scepro tempa povon,  
La eco de timigo kaj majesto,  
En kiu sidas timo de la reĝoj.  
Sed la komparto tiun scepro povon  
Superas, ĝi de reĝoj en la koroj  
Entronigita estas, kaj ĝi ankaŭ  
De Dio mem la propra eco estas;  
Kaj monda pov' simila al la dia,  
Kiam kompart' justecon moderigas.  
Tial hebreo, kvankam vian peton  
Rajtigas la justeco, tamen tion  
Pripensu, ke el ni neniu iam  
Laŭ la justeco vidus paradizon.  
Kiel preĝadas ni por kompleteco,  
Tiel instruas nin la sama preĝo  
Agadi inter ni kun kompleteco.

Trad. Esp. 16479.

## ANEKDOTOJ.

LA HUNDIDO KIU MANĜIS  
PREDIKON.

Pastro Hole, ĉe konferenco en Newcastle rakontis anekdoton pri juna vizitanta pastro, kiu, predikante tre mallongan predikon, klarigis la kaŭzon en la preĝejoĉambro al la preĝejgardistoj. Li diris ke hundido ĉe lia loĝejo eniĝis en lia ĉambro, kaj manĝis duonon da lia prediko. Unu el la preĝejgardistoj diris.—"Tre plaĉos al mi se vi havigus por nia paroĥestro samrasan hundidon." Unu tre respektinda sinjoro, leginte tiun ĉi rakonton, skribis al Hole por demandi ĉu tiu ĉi povas informi lin kiel agis la hundido post kiam ĝi manĝis la predikon. Pastro responde skribis:—"Kara sinjoro, —Plaĉos al vi sciigi, ke post kiam la hundo jam digestis la predikon, lia karaktero ŝanĝiĝis. Li antaŭe estis malgaja; li jam fariĝis tre gaja hundo. Li antaŭe estis egoista kaj eksklusivema en sia hundejo; poste li donacis la hundejon al maljuna pudeio. Li antaŭe estis bruema kaj vulgara;

li jam fariĝis kvieta kaj sinjorema. Li neniam poste gorgbleketis. Kiam oni mordis lin, li ĉiam petas la mordinton ke tiu ĉi mordu lin denove. Li fondis reformojn por malbonaj hundidoj en \* "Insulo de Hundoj," kaj malsanulejon por malsanaj hundoj en \* "Hounds-ditch." Li pasigas ses tagojn el la semajno alkondukante al la hejmo por perditaj hundoj tiujn el siaj gefratoj kiuj erarvagis, kaj estas treege kortuŝanta vidajo, vidi lin dimanĉe, alkondukantan la blindulojn al la preĝejo de l' mateno ĝis la vespero. Laŭ la amerika gazetar, Hole rakontis tiun ĉi anekdoton, kiam li paroladis en Ameriko, kaj multe da homoj vizitis lin por demandi, ĉu oni povas aĉeti por sia propra urbo kelke da idoj de tiu hundo, sed Hole respondis ke Anglujo bezonas monopolon pri tiu raso.

\* Kvartaloj en Londono.

Tradukis G. G.

## ESPERANTA LANDO.

—:o:—

Kie estas nia lando, nia Esperanta Land'?

Ĉu Rusujo pacienca, baraktanta al la lum'?

Ĉu Svisujo kies montoj portas liberecparfum'?

Estas grandaj tiuj landoj, sed pli vasta nia land'.

Kie estas nia lando, nia Esperanta Land'?

Ĉu Anglujo tiel rega en la reĝion' de l'mar'?

Aŭ la malproksimaj lokoj de la sia filinar'?

Estas grandaj tiuj landoj, sed pli vasta nia land'.

Kie estas nia lando, nia Esperanta Land'?

Ĉu Francujo kun spirito, kun fratema ideal'?

Germanujo kun pensema kaj persista special'?

Estas grandaj tiuj landoj, sed pli vasta nia land'.

Nia lando estas ĉie, kie restas homa pland'.

Kie premas manon mano kune kun samidean'?

Aŭ saluto aŭdigata, aŭ la stela talisman'.

Diras "Jen Esperantujo, nia Esperanta Land'".

Dro. S. M'Burney, Esp. 1885.

## KORESPONDADO.

:o:

Sro. Reginald Mackinnon, Invercargill, Nov-Zelando, skribis jene :—“La afero esperanta progresadas entuziasme ĉe ni ; nia societo loka enhavas jam ĉirkaŭ 45 anojn—22 adeptojn, kaj 23 lernantojn—ankaŭ en lernejo, 17 infanojn, kiuj lernas Esperanton rapide : tio estas mirinda, ĉar ili ne ankoraŭ estas lernintaj aliajn fremdajn lingvojn. El ĉiuj elpensajoj enkondukitaĵoj dum la lastaj 50 jaroj, por pligrandigi la interkomunikadon tutmondan, kaj tiel kunligi la homaron de ĉia raso per amikeco, bonvolo kaj estimado, la disvastigado de nia kara lingvo estas la plej grava kaj dezirinda. Vivu ! Gloru ! Kreskadu ! Esperanto por ĉiam.

Frino. Marion Fraser, Brisbane, Q., skribis jene :—“Permesu al mi rakonti venketon pro Esperanto. Antaŭ ne longe, mia fratino, kiu kolektadas aŭtografajojn, skribis al Lordo Roberts por peti la lian, kaj ricevis rifuzon—tiu sinjoro neniam permesas tiajn petojn. Tiam mi lin trudis esperante, kaj ĝin ricevis per la lasta angla poŝto ! Nun mia fratino intencas lerni Esperanton, por pligrandigi sian kolekton. Tiaj estas la uzoj de Esperanto !

De Dro. S. M'Burney, St. Kilda, Melbourne. — Mi paroladis kaj kantis esperante ĉe la konkurso en Numurkah, kie mi juĝis lastan semajnon, kaj ankaŭ donis lecionon ĉe la ŝtatlernejo. La infanoj estis lertaj, kaj la lernejestro tre interesata. Li ne aŭdis pri la lingvo antaŭe.

## EROJ EL BEJKON (BACON).

o

Iome aliformigitaj por la uzado de Esperantistoj de W. Service.

Verkado de nesperta Esperantisto estas ŝatinda nur same kiel la bruado kiun faras muzikistoj akordigantaj siajn muzikilojn ; io kio tute ne plaĉas al la aŭdiĝo, tamen kio dolĉigas la sekvantan muzikon.

La legado plenigas ; la interparolado lertigasla ; verkado precizigas.

Legu nek por disputi, nek por akcepti, nek por diskuti ; sed ĉiam por konsideri kaj juĝi.

## SERCAĴOJ.

DE

A. J. WITTERYCK.

## KONSILO.

Onklino diris al sia nevino, kiu estis edziniĝonta :

“Estu singardema, mia kara nevino, oni devas pripensi dutoje, kiam oni intencas edziniĝi.”

Kaj la ruza nevino, kiu sciis, ke la onklino estis tre malfeliĉa en sia edzeco, reatakis dirante :

“Sed diru, onklino, ĉu vi pripensis ankaŭ dufoje, kiam vi edziniĝis?”

“Certe, mia kara, respondis la onklino, sed kiam mi pripensis la duan fojon, malfeliĉe estis tro malfrue.”

## LA PUNO.

Sinjoro, kiu estis edziniĝonta, sentis riproĉon de konscienco post sia konfeso, kaj iris ree al la konfesprenanto. “Patro,” li diris, “mi ne scias ĉu mi konfesis bone, ĉar vi donis al mi, mi rimarkas, nenian punon.”

Kaj la ruza konfesprenanto respondis : Ĉu vi do ne diris al mi, ke vi baldaŭ edziĝos?”

## SINGARDEMA.

LA KURACISTO: Nun vi estas preskaŭ tute resanigita ; sed vi devas vivadi regul- kaj precipe esti singardema pri la kortuŝajoj.

LA KLIENTO: Estu sufiĉe aminda por rememori pri tio, kiam vi faros min kalkulon.

An encouraging article appears in “The Saturday Observer,” Brisbane, in the column devoted to Esperanto. The following is an extract:—Bonvenu ni la novan naskiĝantan gazeton, per plej koraj salutoj, kaj ni gratulu la Viktorianojn pro la fervoro kaj energio kiu rezultis je la apero de “The Australian Esperantist.” Ke ĝi vivadu, floru kaj meritu la tutkoran subtenadon de ĉiuj bondezirantoj de la ideo de internacia lingvo. Ni konsilas la administracion kaj redaktoron sekvi la fundamenton zamenhofan fidele, kaj ne permesi sin men esti forlogitaj de reformistoj.

Printed and published by R. Dossor, for the Benalla Esperanto Club, Bridge Street, Benalla, in the State of Victoria.



# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 3. JULIO, 1908. PREZO 3 PENCOJ.

## AL NIAJ LEGANTOJ.

Ni ĝojas anonci ke la junian numeron de nia jurnalo oni akceptis multe pli varme ol la majan. Tre kuniĝigajn leterojn ni jam ricevis, kaj ankoraŭ per ĉiu poŝto alvenas aliaj. Multe da skribintoj demandis pri la plej bonaj verkoj por komencantoj. Tiu turnu sin al artikoleto en la maja numero, "Advice to Beginners." Al tio ni aldonu la jenan konsilon: —Ĉiu fervora esperantisto devus posedi, pli aŭ malpli frue, la "Fundamenta Krestomatio"-n de la genia elpensinto de la lingvo, Dr. Zamenhof. Ĝi estas plena gvidisto por la lernanto, kaj ankaŭ prezentas stilmodelon kiun ĉiu esperantisto devus imiti. Kiu zorge trastudis ĝin unu-dufoje, tiu tiel evitos multe da eraroj kiujn kutime faras komencantoj. En la Krestomatio, la majstro nin kondukas, kiel infanojn, tra la ekzercoj, fabeloj kaj legendoj, anekdotoj, ĝis la rakontoj, ĉiuj el kiuj estas bonegaj. Tiam sekvas kelkaj interesaj paĝoj pri la vivo kaj la sciencoj, kaj ankaŭ kelkaj admirindaj artikoloj pri Esperanto mem; fine, 143 paĝoj da poezio. Ni kore rekomendas ĉiujn esperantistojn "legi, marki, ellerni, kaj interne digesti" ĉi tiun kvazaŭan "esperantan biblion." Ili tiel posedos bonegan armilon kontraŭ ĉiaspecaj ŝanĝoj (tiel nomitaj plibonigoj) kiujn kelkaj nuntempaj fantaziuloj en Eŭropo penadas altrudi al la esperantistaro tutmonda.

"Vi friponeto, kial vi envenis en mian domon?" diris malgrasa avarulo al vaganta muso. "Vi ne havas kaŭzon por timi; mi nur loĝados ĉe vi, mi manĝados aliloke," rediris la muso.

E. F. L. el Lucilius.

## TO OUR READERS.

We are glad to announce that the June number of our journal was much more warmly received than that of May. We have already received many very encouraging letters, and others are still arriving by every mail. Many of the writers have enquired as to the best works for beginners. Let them turn to a small article in the May number, "Advice to Beginners." Let us add to this the following advice: —Every fervent Esperantist should sooner or later possess the "Fundamental Chrestomathy," by the ingenious inventor of the language, Dr. Zamenhof. It is a complete guide for the student, and also presents a model of style which every Esperantist should imitate. He who has carefully studied it through once or twice, will thus avoid many of the mistakes which beginners usually make. In the Chrestomathy the Master conducts us, like children, through the exercises, fables and legends, and anecdotes up to the stories, all of which are excellent. Then follow some interesting pages concerning life and the sciences, and also some admirable articles about Esperanto itself; finally, 143 pages of poetry. We heartily recommend all Esperantists to "read, mark, learn and inwardly digest" this, as it were "Esperanto Bible." They will thus possess an excellent weapon against all kinds of changes (so-called improvements), which, at the present time, some eccentric persons in Europe are endeavoring to foist on the universal body of Esperantists.

Readers in other States are requested not to send stamps in future, as they are valueless in Victoria. Postal notes for 6d are now obtainable.

## KORESPONADO.

Frino. L. A. Ward, Hon. Sec. Warburton Esperanto Club, writes:—"Nia grupo ne estas ankoraŭ fondita tri monatojn. Ni havas nun kvardekdu membrojn, kaj multaj ekstere ankaŭ interesigas. Klubkunvenoj okazas duonmonate, kaj kursoj fariĝas intertempe. Sro. Booth, Prez. Melburna Klubo, vizitis nin kaj faris plej interesan priesperantan paroladon. Ni kore bonvenos aliajn samideanojn ĉe Warburton."

From E. T. Cobb, Fitzroy:—"Tiu Esperantaj lernantoj kiuj legadas "The British Esperantist" povas trovi en la maja numero, la unuan el serio da tre interesaj artikoloj pri "La praktikaj ecoj de Esperanto," de Abato Austin Richardson. La unua artikolo traktas "La supersignitajn literojn," nome, ĉ, ĝ, j, ĥ, kaj ŝ.

Oni devas ĝoji ĉar "The Australian Esperantist" presadas tiujn literojn. Jen estas frazo eltirata el la "Internacia Revuo," kiu ne uzadas la supersignitajn literojn:—"Por donaco de ĉiuj verkoj, libroj, broŝuroj, revuoj, artikoloj (eltranchitaj el ĵurnaloj), kiuj rilatas aŭ generale aŭ speciale al la helpingva demando, aŭ al pasigrafio."

Ĉiuj legantoj devas allasi ke ĉi tiu presmaniero ŝajnas tre malgracia kompare kun la nia.—Red.

## A USEFUL ALLY.

The Brisbane "Saturday Observer" still continues to advance the interests of our journal. In the Esperanto column, which is a feature in this popular weekly, "Esperance" writes as follows:—

The local Australian Esperanto gazeto is one which all Australian Esperantists should support. Without your encouragement and financial support in the way of subscription it is impossible to print and publish our little "gazeto." At least 150 subscribers are required to pay the publishing expenses. Surely in Australia there are 150 devoted Esperantists who will send in their subscriptions—three shillings yearly, plus postage—to the editor, Bridge-street, Benalla, Victoria. If you are in

earnest about the idea of an international "help-language," you will at once become subscribers to this journal, which will be a rallying point—a centre to which all can turn. Of course, it is necessarily not yet an elaborate affair, but with your generous aid and support it will soon become to Australia what the British Esperantist, the German Esperantist, etc., is to Britain, Germany, etc., a generous guide to the beginners, a friend to all, and a source of inspiration and encouragement to those who are bearing the burden and the buffets of the battle in the propagation of the idea of the auxiliary language, and mayhap a little weary of the arduous labour, to say nothing of the banter, gibes, and "mokado," to which the propagandist is subject. If you want to hear a man discuss something about which he knows nothing, listen to an opposer of Esperanto airing his views thereon. One is almost inclined to give up discussions, but don't; just take him aside and tell him in the politest way you can that he's "one budgery fella' ass." Poor fellow! he can't help being an ass, though; he's as God made him, and—worse. Even a mosquito has its use in the economy of nature; an unpleasant detail, notwithstanding! But what I was about to say before the scoffer led me from my track, was to ask the Queensland Esperantists to rally round the new "gazeto," and please don't expect too much, and don't be too captious or critical about it. "We are none of us infallible; no, not even the youngest." Here's success to the venture!

## KONVERTIĜO PER SONGO.

Karolo Braun estis rutinulo. Li devenis de longa vico da rutinuloj. Lia avo kontraŭstaris la enkondukadon de fervojoj, kaj sendube lia praavo voĉdonus kontraŭ Galileo, se ĉi tiu saĝulo ne ĉesus insisti pri la ĉirkaŭiraĵo de la terglobo. Estis domaĝo ke la junulo heredis tiajn ideojn, ĉar li estis bela kaj agrabla. Li dancadis ĉarmege, kaj estis tiela majstro de la nobla amindumarto, ke ĉe baloj aŭ vesperkunvenoj, ĉiuj fraŭlinoj vete penadis

allogi lian atentou, kaj pro tio, nia junulo farigis iom maltima kaj trudema. Unu tagon, eniris, la vilaĝon esperantisto, kiu faris bonegan paroladon pri la helpa lingvo, kaj, klarigis la tre simplan gramatikon, k.t.p., tiel ke la tuta aŭdantaro tute ĝin komprenis. Karolo ĉeestis la paroladon, sed li estis tiel impresita de la praavaj antaŭjuĝoj, ke la parolado tute ne interesis lin. Dum la sekvinta semajno li ridadis kaj mokadis la esperantisman ideon, kaj se vi volas scii pri liaj kontraŭdiroj, turnu vi al la "Krestomatio." Malgraŭ tio la kara lingvo disvastiĝadis en la vilaĝo, sed li ankoraŭ daŭrigadis la mokadon. Unu nokton, post kolera argumentado kun kelkaj novaj esperantistoj; en kiu, laŭ sia opinio, li estas venkinto; li iris kuŝiĝi, kaj tuj ekdormis. Songo vizitis lin. Li estis en balsalono, frake vestita laŭkutime; kaj ĉie ĉirkaŭe flirtis nimfsimilaj figuroj ravige ornamitaj. Kiam li povis sufiĉe sin trankviligi, li alproksimiĝis al fraŭlino kiun li rekonis, kaj petis, angle, la honoron danci kun ŝi. Ŝi skuis la kapeton, kaj diris, "Mi ne komprenas vin, sinjoro." "Kion signifas tio?" Karolo pensis en si mem. Kaj aŭskultante iomete, li eksciis ke la tuta ĉeestantaro paroladis en nova lingvo, kaj iel li ne sciis kiel, li konstatis ke tio estas Esperanto. Jen li trovis sin, fremdulo, inter gajaj gesperantistoj, kiuj dancadis, ĉirkaŭflirtis, kaj amindumadis senhonte, antaŭ liaj okuloj mem. Nenia kompata ekrigardo atingis lin. Li malŝparadis sian dolĉecon en dezerta aero. Unu post alia konatulino preterpasis lin neatente, kaj fine li ne povis plu reteni sin, kaj ĉirkaŭprenante la ĉefbelulinon el ĉiuj, li pasie kisis ŝin kaj—ekvekiĝis. Ia nebula, neklara sento ankoraŭ restis ĉe li, kvazaŭ varmaj lipoj redonas liajn kisojn; sed, ellitiĝinte li malsupreniris, por matenmanĝi. Kiel fraŭlo, li tralegis la ĵurnalon manĝante, kaj prezentu al vi lian miregon kiam li ekvidis la jenan reklamon:—

#### "ESPERANTA BALO

"Okazos, la 30an de julio proksima, en la salonego de la Reĝa Institucio je 8.30 p.m. Enirpago, 5/-. Ĉiuj ĉeestontoj, senescepte devos paroli esperante."

"Kion fari?" li pensis, finante

la manĝon; sed li baldaŭ decidiĝis. Rapidirante butikon de librovendisto, kiu okaze estis esperantisto, li aĉetis la lernlibron de O'Connor, kaj dum la sekvintaj vesperoj ĝis la baldato, studis diligente. Estante nature lerta, li baldaŭ ellernis la lingvon kaj aperis ĉe la balo, portante la verdan stelon. Li frue ekvidis la songbelulinon, sed kia diferenco! Ili nun dancadis kune, kaj amindumadis, kaj antaŭ ol la sonorilo batis la nokmezon, li sukcesis—sed en ĉi tiu okazo, ne songe. Li ĉiam dankas la songon por bonega, belega edzino.

Arthur E. Barrington,

#### LA KURAĜO.

Perfekta kuraĝo kaj absoluta malkuraĝeco estas du ekstremajoj kiujn oni malofte atingas. La interspaco estas larĝega, kaj enhavas ĉiujn aliajn specojn de l'kuraĝo, kiuj estas tiel diversaj kiel la homaj vizaĝoj kaj humoroj. Estas viroj kiuj riskas sin volonte en la komenco de batalo, sed kiuj malvigligas kaj malkuraĝas facile se ĝi daŭras. Estas kelkaj kiuj kontentiĝas, plenuminte la socialan honoran leĝaron, kaj faras malmulte plu. Ni rimarkas iujn kiuj en ĉiuj okazoj ne egale estras sian timecon; aliaj lasas sin konfuziĝi pro ĝenerala paniko; aliaj antaŭenkuras al l'atako, tial ke ili timas resti ĉe siaj postenoj. Oni trovas iujn kies kutimeco al malgravaj danĝeroj plifortigas la kuraĝon, kaj pretigas ilin kontraŭstari pli gravajn. Unuj kontraŭstaras glavfrancojn kuraĝe, kaj timegas la pafiladon; aliaj estas neŝanceblaj sub la pafilado, kaj timas glavbatali. Ĉiuj ĉi diversaj specoj de l'kuraĝo similigas pro tio: la nokto, pliiĝante la timecon, kaj kaŝante agojn kaj bonajn kaj malbonajn, ebligas ĉiun homon sin savi. Estas ankaŭ alia pli ĝenerala diskreteco; ĉar estas neniu kiu faras ĉion kion li povus fari en batalo, se li certigis eligi sendanĝere, tial estas klare ke la timo de l'morto de prenas iom de la kuraĝo.

Duc de la Rochefoucauld.

Trad. Esp. 16479.

## ELTIRAĴO EL "RAKONTOJ AL MIA BELULINO."

De Jean Bach Sisley.

Mi citos al vi, mia belulino, nek ĉiujn landojn, kiujn trairis la princo por aliri al la feino de la maroj, nek ĉiujn danĝerojn, kiuj minacis lin; devas esti sufiĉe por vi scii, ke nombraj estis la landoj kaj timindaj la danĝeroj. Li trairis profundajn arbarojn kun funebra ombro, kaj sentis ilian teruregon; li vidis ekfoliantajn arbarojn kun denskreska musko sur kiu ripozis enamigintoj; li, sub la rideto de la festa suno, transiris herbejojn emajlitajn je floroj; li trinkis el kaŝataj fontoj kaj interparoladis kun najtingaloj. Unu nokton, anstataŭ litbaldakeno, li havis la veluran drapiraĵon de la ĉielo dissemita je steloj, alian tagon, li alvenis grandan urbon, en kiu ĉiuj homoj ĝojigis pro la edziĝo de la reĝo; sur la konstruaĵoj, standardoj malvolvigis laŭ la vento; en la stratoj, treme briletis la iluminadoj, kaj la "Vivu!" de la popolamaso estis por la junaj geedzoj glora koncerto edziga. Li estis akceptata en la palaco de tiel bela kaj tiel bona princino, ke ŝajnis al li, ke li vidas la feinon mem de la maroj, kaj, vespere, ekdormante meze de la ĝojkrioj de la popolamaso, li demandis sin, ĉu li daŭrigos la iradon. La morgaŭan tagon, subite eksplodis revolucio. Li estis devigata batali flanke de la reĝo; li estis vundata kaj kaptata, kaj tra la fenestroj de sia malliberejo, li dum longaj tagoj aŭdis la elvokadojn de la malkvietigata popolo kaj la kriegon: "Mortu la tirano!"

Tradukis L. Touchebeuf.

## LA SAGO KAJ LA KANTO.

(El Longfellow.)

Mi pafis sagon en la aeron,  
Ne scias, kie ĝi falis teron;  
La forfluganta tiel rapidis,  
Ke mi la kuron tute ne vidis.

Mi spiris kanton en la aeron,  
Ne scias, kie ĝi falis teron!  
Eĉ la plej bona akrevidanto  
Ne povas sekvi flugon de l'kanto.

Mi longe poste, unu tagon,  
En kverko trovis la tutan sagon;  
La tutan kanton kun la muziko  
Mi trovis en la kor' de amiko.

A. GRABOWSKI.

## KELKAJ PROVERBOJ KAJ MORALAJ PRIPENSOJ.

(De la Rochefoucauld.)

Hipokriteco estas la depago de la malvirto al la virto.

Nek la sunon nek la morton oni povas fikse rigardi.

La homoj ofte fieriĝas pri siaj pasioj, eĉ la plej krimaj; sed la envio estas timega kaj hontinda pasio kiun neniu iam kuraĝas konfesi.

Se ni havus neniujn kulpojn, ne plaĉus al ni rimarki tiujn de aliaj.

La amo kiel la fajro ne povas ekzisti sen daŭra movado, kaj ĉesas vivi tuj kiam ĝi ĉesas esperi aŭ timi.

La espero, kvankam<sup>2</sup> trompema, almenaŭ servas por nin konduki al la vivfino laŭ plaĉa vojo.

Malvirtoj partoprenas en la kompono de virtoj kiel venenoj en la kompono de kuraciloj. La prudento kolektas kaj aliigas ilin, kaj uzas ilin utile kontraŭ la malbonaĵoj de la vivo.

Perfekta kuraĝo estas fari nevidata kion ni povus fari antaŭ la tuta mondo.

A.E.B.

## KELKAJ SPRITAĴOJ.

Kiu povas fanfaroni nur pri siaj famaj prapatroj, similas al la terpomo kies sola virto kuŝas sub la tero.

La plej ŝatinda eco de la morto estas tio, ke oni ne bezonos ellitiĝi matene.

Tallyrand, demandite de sinjorino kion li opinias pri ŝia robo, respondis, ke ĝi komenciĝis tro malfrue, kaj finiĝis tro frue.

Piedfrapo estas tiel efika kiel pulpebrumo por obstina blinda ĉevalo.

L.T.

Printed and published by R. Dossor, for the Benalla Esperanto Club, Bridge Street, Benalla, in the State of Victoria.

# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 4.

AUGUSTO, 1908.

PREZO 3 PENCOJ.

## NACIO SEN LINGVO.

La svisoj prezentas strangan anomalion, nacio sen lingvo, kaj pri tio ili estas solaj inter ĉiuj nacioj de la mondo. Des pli rimarkeble estas kiam oni pripensas ilian egan patriotismon, kaj miregan amon al la patrujo. La oficialaj lingvoj estas germana, franca kaj itala, ĉar ĉi tiuj tri estas la konfesita "patrolingvo" de la plimulto da la loĝantaro. Ĉirkaŭ tri kvaronoj da la popolo parolas germane, dum la ceteraj dividas kvar aliajn lingvojn inter si, precipe la francan kaj italan, kaj la lingvoj diversas ordinarare laŭ tio, kiel la popolo proksimiĝas al ĉiu lando kies lingvon ĝi parolas. Publikajn dokumentojn kaj avizojn oni presadas kaj france kaj germane. En la svisa nacia parlamento la anoj paroladas aŭ france aŭ germane, ĉar preskaŭ ĉiuj parlamentanoj komprenas ĉi tiujn ambaŭ lingvojn. La ordonojn de la Prezidanto tradukisto oficiale tradukas kaj liveras al la ĵurnaloj en ambaŭ lingvoj. Ne estas surprize ke la svisoj frue alprenis la zamenhofan helpan lingvon, nek ke la dua kongreso ĉe Genevo tiel bone sukcesis. Plena kaj tre interesa raporto pri tio jam estas represita el la gazeto. "Lingvo Internacia" kaj ĉiu esperantisto devus ĝin legi.

## HUMILECO.

Mi timas peti kison,  
Rideton eĉ de vi,  
Ĉar se mi ilin havus  
Fiera iĝus mi!

Ne, jen la sola ĝojo  
Por mi, ho amatin'  
Nur kisi la aeron  
Ĵus kiu kisis vin.

—Frino. Tilly Aston esperantigis.

## A NATION WITHOUT A LANGUAGE.

The Swiss constitute that curious anomaly, a nation without a language, and in this they are alone among all the peoples of the world. This is all the more remarkable when their intense patriotism is considered, and their really wonderful love of country. The official languages are German, French and Italian, these three being the recognised "mother-tongue" of the majority of the inhabitants. About three-fourths of the people speak German, while the remainder divide four other languages among them—mainly French and Italian—the languages varying, as a rule, according to the proximity of the people to each country whose tongue they speak. Public documents and notices are printed in both the French and German languages. In the Swiss National Parliament the members make their speeches either in French or German, for nearly all the members understand both these languages. The orders of the President are translated by an official interpreter and furnished to the newspapers in both language. It is not surprising that the Swiss early took to Zamenhof's auxiliary language, nor that the second Congress at Geneva so well succeeded. A full and interesting report of it has now been reprinted from the journal "Lingvo Internacia," and every Esperantist should read it.

## HUMILITY.

[By Robert Herrick.]

I dare not ask a kiss,  
I do not wish a smile,  
Lest having that or this  
I should grow proud the while.  
Ah, no! The utmost share  
Of my delight shall be  
Only to kiss the air  
That lately kissed thee.

## KORESPONDADO.

◆  
Poŝtkarto de la Majstro.

La Redakcio ricevis la jenan: —“Kara sinjoro, la unuan numeron de ‘The Australian Esperantist’ mi ricevis kun plezuro kaj danko. Mi esperas ke la gazeto multe servos al la disvastigado de nia afero en via lando.—Via L. L. Zamenhof.”

Esperanto en la Infanejo.

Antaŭ ne longe, ĉe kunveno de la Melburna Esperantista Klubo, iu fraŭlino rakontis ke ŝi starigis sian kvinjaran nevon sur la tablo, kaj diris al li ŝerce, “You are a big man taller than I; you ought to be able to run fast now.” La knabeto solene respondis: “Malsagŭlino! Mi ne povas kuri sur tablopiedoj;” angle, “Foolish lady, I cannot run on table-legs.”

“Esperanto Lando.”

Dro. McBurney petis nin anonci ke ĉi tiu poemo estas alfarado de poemo de F. G. Rowe, “Nia Lando,” kaj ĉi tiu fakto devis esti presita sub la titolo.

W. L. Elliston, S.A.: Redaktoro, editor; Eldonisto, publisher, Redakcio, editorial department.

Srino. M. D. Harrison: “Tableau,” in our opinion, can best be translated “prezentajo.”

Sro. H. Moodie: “Kara” essentially means “prized;” “multekosta” means “high-priced.”

Frino. L. A. Ward, Warburton: The usual word for “second” (a motion) is “subteni.”

---

 PRI CIKLONOJ.
 

---

◆  
De Bill Nye (Elparolu Bejl Naj.)

Mi deziras anonci ke la Usona ciklonista ofico por la ĉi-tiea distrikto estas de nun sen oficisto. Mi eksigis la 9an de Septembro, A.D. 1884. Mi ne posedas sufiĉe da proprapersona magnetismo por fikse rigardi ciklonon kaj timigi ĝin. Mi estas severa, preskaŭ aroganta en miaj socialaj interrilatoj, sed kiam Manitoĉa—a ventego ekkaptas min per la pantalono, kaj transjetas min trans urbeton, 28 el sekcio 18a, okcidente de la 5a ĉefa meridiano, tiam mi perdas la fieran mienon, kaj fariĝas maltrankvila, eĉ pripensema. Dum 30 jaroj mi sopiris observadi altkreskan cik-

lonon de la speĉo havanta ring-ĉirkaŭatan voston, kiu balaus la verdon teron per grandegaj arboj, kaj donus al la pejzaĝo kvazaŭ lacan aspekton. Je la 9a de Septembro, A.D. 1884, mia malsanema scivoleco estis kontentigita. Kiam popolamaso, portante lanternojn, eniris la arbaron kaj eltiris min el la branĉoj per levilo, mi rimarkigis al ili, se mi korekte memoras, ke mi ne sopiros plu pri atmosferaj fenomenoj. Dum la ĥirurgiisto kunmetis la tibiostojn, por iomete min distri, li demandis kiel mi ŝatas la aŭtunan ventetan fasonon kiu troviĝas en tiu ĉi loko. “Bone kontentigas,” mi respondis, “la malmulto kiun mi jam renkontis.” Tion mi diris per voĉo mordante ironia. Ciklonoj konsistas el du speĉoj, t.e. la nigreblua kaj la griza kun kolhararo kaj vosto palverdaĵ. Estis kun unu el tiu ĉi speĉo ke mi amuzis min je la supredirita dato. Mia frato kaj mi rajdadis tra la majesta multaĝa arbaro, kaj mi ĵus kantis arion el la opero “Peto-leva Lejsej Ĝeju,” kiam mi rimarkis ke la vento ekkomencas zumi inter la arboj. Post nelonge mi rimarkis ke mi ankaŭ zumas inter la arboj, kaj kiam mi nur komencas, tiam mi zumas ne tro malbone. Mia ĉevalo dependis de granda arbobranĉo ĝis kiam oni alvenos kolekti ĝin. Ekrigardante ĉirkaŭen mi ne observis mian fraton, sed post iom da tempo li liberigis sin de ia palisaro, kaj alvenis ĝis kie mi pendis renverse, miaj tutaj posedadoj elfalante, el la poŝoj. Mi diris al li ke mi deziras, tuj kiam la vento iom dolĉiĝos, ke li iru kolekti mian ĉevalon. Tion li faris, kaj je noktmezo aro da amikoj portis min sur tabulo en la urbon. Estis vera festo! Nur prezentu al vi ke procesio, torĉportanta, marŝis en la arbaron dum la nokto, kaj triumfe portis min sur la ŝultroj en la urbon. Kaj tamen mi iam estis malriĉa knabo! Tio ĉi montras kiom prosperas tiu kiu penadas, kaj persiste celas pli bonan vivmanieron. La ciklono estas natura fenomeno kiu ĝuas la plej bonan sanstaton. Eble estas interese por fortuloj esplori ĝiajn kutimojn, sed koncerne min, mi ne volus havi fenomenon en la domo dum tuta jaro sen miaparta plendo.

TRADUKIS W. SERVICE.

## LA LEVIĜO DE NILO.

(El "La Faraono" B. Prus, tradukis "Kabe.")

La akvo de Nilo, antaŭe verda, fariĝis blanka, poste ruĝa kaj senĉese kreskis. La reĝa akvomontroilo en Memfiso estis plenigita preskaŭ ĝis la alteco de du homoj, kaj Nilo kreskis ĉiutage je du manlarĝoj. La plej malaltaj kampoj estis superverŝitaj, de la pli altaj oni rapide kolektis linon, vinberojn kaj specon de kotono. Sur la lokoj, kiuj matene estis ankoraŭ sekaj, vespere plaŭdis la ondoj. Ŝajnis, ke fortega kvankam nevidebla vento blovas de la fundo de l'rivero. Ĝi plugas sur ĝi grandajn sulkojn kaj plenigas per ŝaŭmo, poste glatigas la supraĵojn de la akvo, kaj post momento tordas ĝin en senfundajn akvoturnojn. Ree ĝi plugas, ree glatigas, tordas, alpelas novajn akvajn montojn, novajn ŝaŭmajn striojn kaj senĉese levas la murmurantan riveron, senĉese akiras novajn terajn pecojn. Ifoje la akvo, atinginte ian limon, transsaltas ĝin en la daŭro de unu ekrigardo, versigas sur la malaltajon kaj formas brilantan lageton tie, kie antaŭ unu momento la velkintaj herboj falis teren cindrigitaj. Kvankam la leviĝo atingis apenaŭ la trionon de la ordinara alteco, jam la tuta bordo estis subakvigita. Ĉiuhore iu bieno sur monteto fariĝis sim la al insulo, en la komenco, apartigita de la aliaj nur per mallarĝa kanalo, kiu iom post iom plilarĝiĝis kaj pli kaj pli apartigis de la najbaraj domaj la novan insulon. Ofte iu, kiu eliris al la laboro piede, revenis en ŝipeto. Pli kaj pli multe da ŝipetoj kaj flosoj aperis sur Nilo. De unuj oni fiŝkaptis per retoj, en aliaj oni transportis la rikoltojn en la grenojn aŭ le blekantajn brutojn en la stalojn, en aliaj oni akceptis vizitojn, por anonci al ili la leviĝon de Ni'lo (kiun vidus ĉiuj), interridoj kaj krioj. Ifoje ŝipetoj, kunigintaj kiel aro da anseroj, diskuradis en ĉiujn direktojn por tralasi grandegan floson, kiu portis el Supra Egipto malsupren grandegajn ŝtonojn, elhakitajn en la apudbordaj minejoj. En la aero ĉie, kie povis aŭdi la orelo, sonis la kreskanta akvo, krio de la timigitaj birdoj kaj ĝajaj kantoj de l'homoj: Nilo leviĝas, ni havas multe da greno.

## KIO DISTINGIGOS LA DEK- DUA CENTJARO ?

La deknaŭa centjaro estis distingige centjaro de elpensado. Ĉu la dudeka ĝin superos per elpensajoj egalrangaj al vaporo, elektro, senfida telegrafo, la rikoltmaŝino kaj la skribmaŝino, estas ankoraŭ tro frue por diri. Tamen oni povas antaŭdiri ke se per ia serio da bonŝancaĵoj ĝi meritis ke oni nomu ĝin "centjaro de reeltrovoj," ĝi ricevus la dankon de la posteularo, kaj riĉeco krom fameco estus la akiro de tiuj kiuj povus rehavigi al la homaro iujn rimarkindajn sekretojn kiuj estis bone konataj de la civilizita mondo antaŭ multe da centjaroj. En la vasta tenejo de la Forgeseco sin trovas miloj da scieroj kiujn posedis multe da homoj kiam la terglobo estis multe pli juna ol nuntempe. Sed ili estas tiel plenege forgesitaj de l'homaro, ke oni nun ilin aludas kiel perditaj sekretoj, tiel malfacile reeltroveblaj kiel tiuj kiuj sin kaŝas en la misteraj notoj de Stradivaria violono.

## PRIPENSOJ DE FRAŬLO.

La virinoj malofte ŝatas bonan viron ĝis kiam ili jam intime konis malbonan.

Viro ricevas en sia edziĝtago du specojn de simpatio; la simpatio de liaj amikinoj kiuj opinias ke li similas al malsaĝulo, kaj la simpatio de liaj fratulaj amikoj kiuj opinias ke li efektive estas malsaĝulo.

La paroladarto konsistas el la grupigado de vortoj, ne lacigante la cerbojn de la aŭskultantoj.

Neŭiam konfesu viajn kulpojn se vi ne volas ke viaj amikoj konsentu kun vi.

## KAŬZO TROVITA.

Iu renkontis sinjorinon kun ŝia knabino, kaj diris: "Ho, sinjorino, vi havas belegan infanon; ŝi havas la hararon de ŝia patro!"

"Nun, mi scias kial mia patro portas perukon!" ekkriis subite la knabino.

## ANEKDOTOJ.

## Skota Ĝentileco.

Unu evangeliisto foje vizitis paroĥon, kaj en la daŭro de prediko, diris:—"Nun miaj karaj amikoj, ĉiuj kiuj deziras iri ĉielon, bonvolu starigi," kaj kun du esceptoj la aŭdantaro starigis ĉiuope. Tre ĝojigita de tia fervoro, la predikisto petis ke ĉiuj kiuj deziras iri—aliloken, anoncu tion sammaniere. Dum 30 sekundoj neniu sin movis; tiam Jaĉjo sin levis en sia loko, kaj staradis tute trankvile. "Vi certe tute ne komprenis kion mi ĵus diris. Ĉu vi ja intencas atesti ke vi estas preta iri—kien mi ĵus citis?" "Mi ne deziras tian vojon," diris Jaĉjo afable, "sed mi ne povis toleri rigardadi vin starantan sole kiam vi estas fremdulo en la paroĥo.

E.F.L. el Ian Maclaren.

## Grava Malkompreniĝo.

La urbestro de malgranda urbo, rajdante sur sia nova biciklo, sin trovis je krepusko malproksime de sia hejmo, kaj bezonante urĝe akvon por sia acetilena lampo, li rajdis antaŭen, timante ĉiumomente renkonti la vilaĝan policanon; ĝis fine li ekvidis laboriston, kiun li konis, starantan ĉe la pordo de sia dometo. "Ĉu vi kompleze donos al mi iom da akvo por mia lampo?" diris la urbestro. "Kion!" respondis la laboristo; "mi supozas ke vi volas diri oleon." "Ne, mi bezonas akvon," rediris l'urbestro. La laboristo rigardegis la cikliston momente kaj diris, "Prenu mian konsilon; reiru hejmen rapide; vi devus honti pri vi mem, je via aĝo, estante ankaŭ la urbestro."

Esp. H.M.

## Unu Metodo.

Pastro unu dimanĉon antaŭ ne longe instruis al lernantaro, kaj penis klarigi la dogmaron ke kiam la koroj de la homoj estas pekaj, oni devus reguligi ilin. Elpoŝigante sian poŝhorloĝon, kaj tenante ĝin supren, li diris, "Jen estas mia poŝhorloĝo. Supozu vi ke ĝi ne montrus la korektan horon, ĵen tro rapide, ĵen tro malrapide; kion mi devus fari el ĝi?" "Vendu ĝin," tuj respondis unu el la knaboj.

Esp. H.M.

## NIA DEVO NUNA.

En niaj paroladoj kaj artikoloj ni ĉiuj ofte diris ke Esperanto estas facile lernebla kaj parolebla. Nun ni devus tion pli bone elmontri. Jam multe da personoj rimarkigis al mi, kaj sendube ankaŭ al vi, ke malgraŭ la progresoj de nia ideo, la nombro da esperantistoj kapablaj paroli kaj skribi iom flue, aŭ almenaŭ senrare, tute ne estas granda. Ni konfesu ke tiuj personoj estis pravaj, parolante tiel. Ofte ni legas ke tiu aŭ ĉi tiu grupo enhavas jam tiom da membroj. Sed neniam ni faras al ni la demandon jenan:—"El la multaj membroj de l'diritaj grupoj, kiom estas kapablaj montri al la skeptikuloj per faktoj, per pruvoj, ke Esperanto estas vere parolebla, skribebla, unuvorte, taŭga por la servoj kiujn oni rajtas postuli de ĝi? Kiom povus vere uzi Esperanton?" Kaj oni min bone komprenu. Mi tute ne pretendas ke, de nun, ĉiuj esperantistoj devas ĉie kaj ĉiam fari paroladojn aŭ verki artikolojn en nia lingvo. Ne, ĉar nek en la esperanta afero, nek en iu ajn alia agadkampo oni povas kuri antaŭ ol marŝi; sed mi opinias precize ke nia nuna devo estas perfektigi en la kono de Esperanto, por ke ni povu ĝin uzi. Ne sufiĉas nur varbi novajn adeptojn, aŭ aprobantojn, ni devas ankaŭ varbi nin mem pli plene. Plu ne sufiĉas ŝati, laŭdi, kanti Esperanton, sed estas ankaŭ necese ĝin koni! Ni do lernu, lernadu ĝin, spite ĝia facileco. Ni pripensu ke la hodiaŭaj esperantistoj nepre fariĝos la instruantoj de l'varbitoj estontaj. Pro tio mi opinias ke, inter niaj nunaj devoj, la ĉefa eble ne estas iri ĉiam de lokoj al lokoj, paroladante pri Esperanto; ĝi konsistas el tio; resti kelkafoje hejme en nia skriboĉambro, sidi je nia tablo, kaj, havante esperantan libron sub la okuloj, kraĵonon en la mano, legi, noti, labori.

JEAN WEGNER, Neuchatel.

El la "Svisa Espero."

Printed and published by R. Dossor, for the Benalla Esperanto Club, Bridge Street, Benalla, in the State of Victoria.



# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. I. N-RO. 5.    SEPTEMBRO, 1908.    PREZO 3 PENCOJ.

## KELKAJ PROPAGANDAĴ MALFACILAĴOJ.

Unu el la plej grandaj kontraŭaĵoj kiujn renkontas esperantaj propagandistoj en ĉi tiu kontinento, estas la antaŭjuĝo de la meza Aŭstraliano kontraŭ iu ajn fremda lingvo. "La angla lingvo," ili insistas, "fariĝos post ne longe la tutmonda lingvo; kaj englutos la ceterajn kiel, antikvatempe, la verĝo de Moiso englutis tiujn de la faraonaj magiistoj." Ni ne devas forgesi; ke kvankam la patriotismo estas tre dezirinda virto, tamen la patriotismo frenezigiĝinta povas facile fariĝi nacia ŝovinismo. Ankaŭ ni permesu al la ceteraj nacioj havi almenaŭ tiom da lojaleco al sia lando kaj lingvo, kiom havas ni; kaj ni konstatos la neeblecon ke la angla pli ol la franca aŭ germana lingvoj estu akceptita de la civilizita mondo kiel internacia. Fakte, estas neverŝajne ke post miloj da jaroj, se en ia estonta tempo, iam ekzistos vere tutmonda lingvo. Tio, kion oni bezonas nuntempe, estas helpa lingvo, kaj ni esperantistoj pretendas ke ni jam posedas ĝin. Ni rekomendas al ĉiuj aŭstralianoj, kaj precipe al la gejunuloj, ellerni Esperanton, kies studado ne nur faciligas interkomunikadon kun fremduloj, sed ankaŭ ebligas la ellerninton interrilati senpere al moderna pensado kaj progresado en aliaj landoj. Estas rimarkinda rekomendo por Esperanto, ke ĝiaj kontraŭuloj ĉiam estas tiuj kiuj scias la plej malmulte pri la afero, kaj ke ĉiu kiu donis al la lingvo veran atenton, fariĝis ĝia entuziasma subtenanto. Fine, ni atentigu ĉiujn aŭstralianojn al la fakto ke la plej rapidaj progresoj de Esperanta en la lasta tempo okazis en Anglujo kaj Ameriko, ambaŭ angle parolantaj nacioj.

## SOME PROPAGANDA DIFFICULTIES

One of the greatest obstacles which Esperanto propagandists meet in this Continent is the prejudice of the average Australian against any foreign tongue whatever. "The English language," they insist, "will be the universal language before many years, and will swallow up the others as Moses' rod of old swallowed up those of Pharaoh's magicians." We must not forget that, although patriotism is a very desirable virtue, patriotism run mad may easily become chauvinism. Also, let us permit the other nations to have, at least, as much loyalty to their country and language as we have, and we shall see the impossibility of the English, any more than the French or German languages, becoming accepted by the civilised world as international. In fact, it is unlikely that for many thousands of years, if at any future time, there will ever exist a truly universal language. What is needed in the present day is an auxiliary language, and we Esperantists claim that we already possess it. We recommend all Australians, and especially the young, to thoroughly master Esperanto, the study of which not only renders intercommunication with foreigners easy, but also enables the student to get into direct touch with modern thought and progress in other lands. It is a remarkable recommendation for Esperanto that its opponents are invariably those who know least about the subject, and that everyone who has given the language genuine attention has become its enthusiastic supporter. Lastly, let us draw the attention of all Australians to the fact that the most rapid progress of Esperanto in recent times has taken place in England and America, both English-speaking nations.

## KORESPONDADO.

J. H. CADELL: Ne sufiĉe da publika intereso en la supa anekdoto.

REV. W. D. KENNEDY, Tumut, skribas - "En Tumut, N.S.W., ni havas malgrandan klubon nomitan 'Ĉiela Lumo Gvidu,' kaj kunvenas ĉiun mardon vespere. Ni uzas 'Tuta Esperanto'-n, kaj 'Esperanto por la milionoj'-n, kiel, lernlibroj, kiujn ni trovas tre bonaj kiel propagandiloj, kaj nun ni tralegas tra 'Ora Saflano.' Frino. Ruth Beuzeville estas nia sekretario kaj kasisto." Vi devus havigi al vi "The Standard Course of Esperanto" de George W. Bullen, aŭ "The Student's Text-Book" de Dro. O'Connor. Ni deziras al via klubo plenan sukceson.

P. TARNOW, Hannover: Ni esperas ke vi bonvole sendos ekzempleron de la "Poŝkalendario 1909."

B. H. FRYER, Sydney: Via "Streko de Filozofio" perdas la spritecon, tradukita en Esperanto.

FRINO. I. G. NOAR, Warburton, skribis jene:—"Permesu al mi sendi kelkajn juvelojn el la trezorujo de la verkoj de Emmanuel Swedenburg. 'La tuto da religio rilatas al la vivo; kaj la vivo de l'religio estas fari la bonon.' 'Nenio ekzistas en la natura mondo kio ne devenas de la spirita mondo, ĉar la natura mondo estas la mondo de kaŭzoj.' 'La amo al la Sinjoro Dio kaj la proksimumo faras paradizon; sed la amo al si mem kaj la mondo faras inferon'"

SRO. F. H. LEWIS, skribas: "Bonvolu esperantigi la jenan:—

Little drops of water,  
Little grains of sand,  
Make the mighty ocean,  
And the beauteous land."

Mi turnis min al nia loka poeto, kaj li liveris la jenan:—

El etaj akvaj gutoj,  
Kaj etaj sablaj eroj,  
Fariĝas l'oceano,  
Kaj la belegaj teroj.

H.M. Respondante viajn demandojn pri la jenaj anglaj frazoj:—"Robbed us of," "Rabis al ni;" "A great blow to," "Granda bato por;" "Did me the honour,"

"Faris al mi la honoron;" "Without knowing us," "Sen koni nin;" "Turn your attention to the man," "Turnu vian atenton sur la homon;" "To thank you for coming," "Danki al vi por veni."

[Ni deziras danki la redakciojn de "La Pola Esperantisto," "La Socio Revuo," kaj kelkajn aliajn eŭropajn gazetojn pro iliaj komplezaj interŝanĝoj. La unue citita estas tre leginda kaj utila organo.]

## REDAKCIO.

Pri artikoloj, leteroj, kaj alia sendaĵoj, la Redakcio rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p.; tial utile estus konservi kopion por komparo.

[Ĉiuj komunikajoj devas esti sendataj al la Redaktoro.—DRO. A. E. BARRINGTON, Benalla.]

## STRANGA FAKTO PRI LA TEMPO.

Du personoj naskiĝis en la sama loko, kaj je la sama momento. Travivinte kvindek jarojn, ili ambaŭ mortis, ankaŭ en la sama loko kaj je la sama momento. Tamen unu travivis cent tagojn pli ol la alia. Kiel tio estis ebla? Jen la klarigo. Iu ĉirkaŭvojaĝante la terglobon okcidenten, perdas unu tagon, kaj, orienten, gajnas unu tagon. Supozante ke du personoj naskiĝis en Cape Town, de kie oni povas dum unu jaro ĉirkaŭvojaĝi la terglobon. Se unu senhalte tion faris okcidenten, post kvindek jaroj li estos kvindek tagojn malantaŭ la senmovaj loĝantoj; kaj se la alia naĝadis sammaniere orienten, post kvindek jaroj li sin trovas kvindek tagojn antaŭ ili. Unu do estos vidinta cent tagojn pli ol la alia, kvankam ili ambaŭ naskiĝis kaj mortis en la sama loko, kaj je la sama momento, kaj eĉ vivadis la tutan tempon en sama latitudo, kaj kalkulis la tempon per sama kalendario.

## IMPORTANT NOTICE.

Those readers who have not yet subscribed to this Journal are requested to notify the Editor whether they wish to subscribe or not, otherwise they will not receive the paper in future.

## ABELPIKOJ POR REŬMATISMO.

Sro. Pop legis en sia ĵurnalo paragrafon certigantan ke la piko de abelo estas nepra resanigilo por reŭmatismo. Li ekpensis pri la reŭmatismaj spasmoj kiuj turmentis liajn genuojn. Li tralegis la paragrafon kelkfoje. Oni devas preni la abelon per la oreloj, kaj almeti ĝin al la reŭmatisma artikolo, kaj lasi ĝin pikadi ĝis kiam ĝi ne plu povos. Li decidis fari la eksperimenton, kaj kontraktis kun sia fileto pri la provizo de l' abeloj. Por la malgranda kosto de duonpenco, la kuabo devis provizi, nome, ses abelojn, sekso kaj aĝo ne citataj. Vespero altiras ĉiujn hejmen, kaj la lastaj radioj de la subiranta suno iluminis la knabeton kun mallonga larĝbuŝa botelo, komforte plenigita de varmaj, malicaj abeloj. La duonpenco kaj la botelo interŝanĝiĝis. Sro. Pop enmetis la botelon en sian poŝon, kaj al neniu konfidis sian kulpan sekreton. Li kaŝis la abelojn en sia litĉambro, kaj kiam li ilin observis atente, li tre volis ke tiuj ne ŝajnas tiel varmaj kaj malfablaĵaj. Fine alvenis la horo por kuŝi, kaj unuope la familianoj supreniris por enlitiĝi. Sed Sro. Pop sentis strangan antipation supreniri la ŝtuparon. Li longe prokrastis ĉe la ĵurnalo kaj sia lasta pipo. Kiam li pensis ke la edzino jam dormis, li kulpe suprenrampis. El la lito aŭdiĝis la mallaŭta, regula spirado de la ripozema Srino. Pop. En la tirkesto de la vestotenejo ripozis la botelo da abeloj. Pli ĝustedire, la botelo ripozis, ne la abeloj: tiuj estis pli varmaj, pli malicaj, kaj malpli ripozemaj ol antaŭe. Sro. Pop malrapide senvestiĝis, kaj enrampis en la liton. Kuŝinte kviete kelkajn momentojn, li etendis la manon kaj prenis la botelon. Ne estas facile kapti unuoblan abelon el plena botelo sendanĝere. La unua abelo kiun kaptis Sro. Pop, estis malgranda bruna mielabelo kiu ne pezus duonuncon se oni ĝin prenis per la oreloj, sed prenita per la postpiedo, ĝi peze egalas la postkruron de bruna mulo. Sro. Pop ne povis subpremi ĝemon. "Kio estas al vi?" demandis dormeme la edzino. Estis tre malfacile por Sro. Pop certigi ke li nur tro varmiĝas, tamen

li tion diris. Eŝefektive li estis varmega — ĉirkaŭ 100 gradojn tutkorpe, kaj 197 gradojn ĉe la pinto de la dikfingro. Li renversis la abelon, kaj almetis la militaman ekstremajon al la reŭmatisma genuo. Ĝi ne doloris tiel severe kiel li atendis. Fakte, ĝi tute ne doloris. Tiam Sro. Pop memoris ke kiam mielabelo pikas homan malamikon ĝi kutime lasas sian harpunon en la vundo, kaj ke la sola ilo per kiu ĝi povus piki, sin okupas ĉe la ekstremajo de la dikfingro. Li elŝovis la brakon el sub la litkovriloj, kaj lasis fali la kriplan atomon da reŭmatisma linimento sur la tapiŝon. Tiam post sekunda paŭzo, li komencis serĉi la botelon, kaj tre deziris scii kie kuŝas ĝi. Dum la intertempo jam okazis strangaj aferoj. Kiam Sro. Pop ekkaptis la unuan abelon, li kompreneble ĝin eltiris tiel rapide ke li tute forgesis la botelon kaj ĝian resanigan enhavon, kaj lasis ĝin kuŝi neŝtopatan en la lito inter si mem kaj sia senkulpa edzino. En la mallumo okazis kvieta kaj ĉiuopa elmigrado el la botelo. La abeloj disrampis sencele sur la drapo. Dum Sro. Pop palpe serĉis la botelon, liajn orelojn atakis, kaj lian koron glaciigis penetranta kriego de lia edzino. "Mortigo!" ŝi kriegis, "Mortigo, ho, helpu! helpu!" helpu!" Sro. Pop ekvidis en la lito. Liaj haroj ekstarigis vertikale. La nokto estis varma, sed li kvazaŭ frostremis. "K-k-kie—Dibenu! kie estas la abeloj?" li balbutis per palaj lipoj, dum li palpis tra la tuta lito freneze kaj rapidege. Kaj granda abelego kun pikilo senkompata kiel la fingro de Malestimo, ĝuste tiam suprenrampis interne de lia ĉemizo ĝis ĝi atingis lokon precize inter la ŝultroj, kaj boris en lian internajon; Kaj Srino. Pop hontis pri siaj malfortaj kriegoj, kiam Sro. Pop etendis ambaŭ brakojn, kaj, kun bruego kiu kraketigis la fenestrojn, kriegis, "Ĝin forprenu! ho, lando de Skot! iu ĝin forprenu!" Kaj kiam malgranda mielabelo komencis tikli la plandon de Srino. Pop, ŝi ĝemegis kaj refalis en spasmojn. Samtempe la domanoj evekiĝis. La gefratoj Pop kaj la servistoj enkuregis en la ĉambron, kaj pliiĝis la ĝeneralan konfuzon, kriegante hazarde, kaj farante sencelajn demandojn, dum ili rigardis la figuron de homo iom

maljuna, vestita per longa nokto-  
ĉezimo, kiu palpegis freneze al la  
neatingebla loko ĉe la mezo de sia  
dorso, kaj dancadis kontraŭnature  
sub la duba religia lumo de la  
noktolampo. Kaj dum li dancadis  
kaj kriegadis, kaj dum ili rigardadis  
konfuzite, blua vespa kiun la knabo  
Pop enmetis en la botelon, kiel  
supermezuro, kaj por ekscitadi la  
bestojn, aljetis sin trans la ĉambron,  
kaj ĝis sia morttago Sro. Pop kredos  
ke unu el la servistoj malprave  
opiniis lin domorabisto, kaj lin  
pafis. Neniu, ne eĉ Sro. Pop mem  
povis dubi ke, almenaŭ je tiu  
momento, forestas la reŭmatismo.

(El "Life" tradukis Arthur E.  
Barrington.)

### NE PROFESIE.

Iu maljuna komercisto kiu havis  
kelke da avidaj parencoj malsaniĝis,  
kaj kiam la kuracisto ne plu esperis  
lian resaniĝon, alvokis sian proku-  
ratoron kaj diktis al la sian testa-  
menton. La sekvantan tagon la  
prokuratoro revizitis la malsanulon,  
kiu demandis, "Ĉu vi plenumis  
precize miajn instrukciojn pri la  
testamento?" "Precize, sinjoro."  
"Vi estas certe pri tio?" "Absol-  
ute, sinjoro." "Bone; ni nun  
ankoraŭ havas demandon por fari  
sed ne profesie; kiu el la testa-  
mentatoj fine ricevos la havon?"  
—C.E.M.

Unua bubo: "Kiel vi enfalis en  
la akvon?"

Dua bubo: "Kiu sciigis vin pri  
tio?"

Unua bubo: "Vi vidiĝas pura."

### EN LA PARKO.

"Mi ne statis antaŭe kiel nun-  
tempe, diris ĉifona oratoraĉo.  
"Kiam unufoje mi malfermis la  
okulojn en ĉi tiu malhonesto mondo,  
mia familia stato estis multe pli  
feliĉa ol nuntempe, Tempo estis  
kiam nenian lukson mi deziris kiun  
mi ne ricevis; kiam mia ĉia deziro  
plenumiĝis; kiam mi kutimis pre-  
terpasi ĉi tiun lokon mem en mia  
propra kaleŝo, kaj mia patrino  
—Di' beŭu ŝin"—"Kutimis puŝi  
ĝin, kriegis nesimpatio ĉeestanto,  
kiu konis la parolanton antaŭe.  
—J. H. T.

### VERA DANKECO.

(El letero al familia kuracisto.)

"Kara doktoro:—Ĉi tie enfer-  
mitan, vi trovos ĉekon pro profesiaj  
servoj faritaj de vi por mia mor-  
tinta onklo. Mi vin dankas pri  
via tiama penado, kaj mi nepre vin  
rekomendos al ĉiuj miaj aliaj riĉaj  
parencoj."

### ANONCOJ.

SRO. N. ALEKANDROV, Peter-  
burgo (Rusujo).—Nikolajevskaja  
33 log. 24; deziras korespondadi  
kun ĉiulandaj geesperantistoj per  
poŝtkartoj ilustritaj aŭ per leteroj.

SRO. S. PETROV, Peterburgo  
(Rusujo):—P. Samsonjevsky 62  
k 7, deziras korespondadi kun ali-  
landuloj, poŝtkarte aŭ letere.

### PERSONA ANEKDOTO.

La fama franca kuracisto Ricord  
unu tagon promenis laŭ la bule-  
vardoj en Parizo, kiam li renkontis  
maljunan sinjoron kiu estis tre  
riĉa, sed kiu samtempe distingis  
per sia treega avareco. La mal-  
junulo kiu estis hipoĥondriulo,  
esperante ricevi iom da profesia  
konsilo senpage, diris, "Doktoro,  
mi sentas min tre malsana." "Kie  
vi pleje suferas?" "Ĉe la stomako."  
"Ha, estas domaĝo. Bonvolu  
fermi la okulojn. Bone. Nun,  
elpuŝu la langon, por ke mi povu  
ĝin esplori." La malsanulo faris  
laŭ la ordono. Post kiam li pacience  
atendadis dum dek minutoj li mal-  
fermis la okulojn, kaj sin trovis  
ĉirkaŭitan de amaso kiu supozis ke  
li estas freneza. Dro. Ricord dume  
malaperis.—[El Life.]

### INFORMO.

Sinjorino (al la poŝta fenes-  
treto): Ĉu tiu ĉi estas la oficejo  
por, informoj, sinjoro?

Oficisto: Jes, fraŭlino. Kion vi  
deziras scii?

Sinjorino: Ĉu vi volas diri al  
mi ĉu mia ĉapelo estas rekte  
metita.

Printed and published by R. Dossor,  
for the Benalla Esperanto Club,  
Bridge Street, Benalla, in the  
State of Victoria.

# THE Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 6. OKTOBRO, 1908. PREZO 3 PENCOJ.

## LA SORTO DE PERFIDULO.

Kiuj diligente studis la "Fundamentan Krestomation," tiuj ne povis ne rimarki elokventan artikolon de Sro. L. de Beaufront, "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia." Plejaltgrade konvinka, ĉi tiu artikolo jam estas tradukita en kelke da naciaj lingvoj, kaj uzita kiel valora propagandilo. De kelka tempo oni sciis ke ekzistis tiel nomitaj reformistoj kiuj penadis enkonduki plibonigojn en la gramatikon esperantan, kaj ke nova lingvista projekto estis pridiskutita, nome "Ido," kiu celas kombini ĉiujn plibonigojn, kaj krei novan plisimplan helplingvon. Ĉi tio neniel maltrankviligis la esperantistaron. De kiam Zamenhof komencis sian entreprenon, ne mankas personoj kiuj imagas ke ili povas plibonigi la lingvon per diversaj aliigoj. Malpleje maltrankviligis la Majstro mem. Li estis rimarkinta la progresojn de sia afero de limaka rapideco ĝis tiu de rapidvagonaro, kaj sciante ke la lingvo jam fariĝis afero vivanta, nedetrubla, li transdonis al komitato elektita en kongreso, ĉiujn lingvajn demandojn. Li eĉ elektis Sron. de Beaufront kiel sia fidinda leŭtenanto, por reprezenti lin en tiu komitato. Kontraŭ ĉiuj atendoj, la komitato decidis aliformigi la zamenhofan Esperanton laŭ la postuloj de "Ido," tiel nuligante la solenan deklaron de Boulogne. Nun troviĝis ke "Ido" estas Sro. de Beaufront mem. La Majstro insistis ke Sro. de Beaufront iam konigis al li, konfidence aŭ ne ke tiu opinias, ke reformoj estas necesaj en Esperanto, alie li neniam povis komisi tiun sinjoron kiel sian reprezentanton en la Komitato. La esperantista gazetaro preskaŭ senescepte, kulpigis la perfidulon, unuj

## THE FATE OF A TRAITOR.

Those who have diligently studied the "Fundamenta Krestomatio" cannot have failed to notice an eloquent article by M. L. de Beaufront, "The Essence and Future of the Idea of an International Language." In the highest degree convincing, this article has already been translated into several of the national languages, and used as a valuable means of propaganda. For some time it was known there existed so-called reformers, who were endeavoring to introduce improvements into the Esperanto grammar, and that a new linguistic project had been discussed—viz., "Ido," which aimed at combining all the improvements, and creating a new, more simple auxiliary language. This in no way troubled the Esperanto world. Since Zamenhof commenced his undertaking, persons were not lacking who imagined that they could improve the language by various alterations. Least of all was the Master himself disturbed. He had watched the progress of his affair, from a snail's pace to that of an express train, and knowing that the language had already become a living, indestructible thing, he had handed over to a committee, elected in Congress, all linguistic demands. He had even chosen M. de Beaufront as his trustworthy lieutenant, to represent him on that committee. Contrary to all expectations, the committee decided to alter Zamenhof's Esperanto in accordance with the demands of "Ido," thus nullifying the solemn declaration of Boulogne. It has now been found that "Ido" is M. de Beaufront himself. The Master expressly denies that M. de Beaufront ever made known to him, confidentially or otherwise, that he thought

smoke, aliaj sarkasme, sed ĉiuj fervore. Ĉi tiu solidareco de la esperantistaro kies opinion la gazetaro esprimas, devas esti tre ŝatata de la Majstro, kaj ni opinias ke ju malpli oni atentis la projekton, des pli bone. Ĝi deveniĝis en perfideco, ĝi peris en bone meritita malfameco.

### KORESPONDADO.

[De nia propra korespondanto.]

Londono, 20a de Aŭgusto, 1908.

#### KARAJ SAMIDEANOJ,

Dum du monatoj mi riproĉis min pro la terura prokrasto kiun mi faris, ne skribinte plue al miuj multaj Aŭstraliaj geamikoj. Oĝe mi decidis skribi por kuragiĝi la Tasmaniajn samideanojn, kiuj tiel aminde akceptis min, aŭ la Durbanonajn kiuj donis Esperantan bonvenon. Sed mi ne povis forgesi miajn klubanojn ĉe Melburno kies amindecon mi ĉiam memoros, aŭ la Christchurch-anoj kies klubo mi helpis fondi. Ankaŭ mi certe devas skribi al la Invercargill-anoj kaj la Brisbane-anoj, ne forgesante la samideanojn en Benalla kaj Sydney, k.t.p. La tasko tute subpremis min ĝis la feliĉa tago kiam mi sciigis pri la "Australian Esperantist" kaj mi sendis ĉi tiun leteron timeme esperante ke la redaktoro ĝin akceptos. Se jes, mi skribos iom da babilado ĉiunonate. Pri la reciproka interkompreniĝo, mi certigas ke ĝis nun mi ankoraŭ ne renkontis eĉ unu samideanon kiun mi ne komprenis, aŭ kun kiun mi ne povis facile interbabilu. Dum la vojaĝo al Anglujo per "Suevic," mi fondiĝis Suevikan Esperantan Klubon. La anoj reprezentis 10 landojn, kaj dum pli ol unu monato ni kunvenis po unu horo ĉiutage, eĉ dum la plej varmega vetero. Ĉi Aŭstralia ŝtato sendis anon, kaj kiam la klubanoj revenos hejmen, sendube ili antaŭenprenos la aferon. Ĝis la reskribo, via frate.

—CEDRIC F. WHITE.

### KOREKTAĴO.

En la septembra numero aperis eraro sur paĝo 2a, linio 35a. La tuta frazo devis esti, "Nenio ekzistas en la natura mondo kio ne devenas de la spirita mondo, ĉar la spirita mondo estas la mondo de kaŭzoj."

that reforms were necessary in Esperanto; otherwise, he could never have appointed that gentleman as his representative on the committee. The Esperanto press, almost without exception, have accused the traitor—some mockingly, some sarcastically, but all heartily. This solidarity of the Esperanto body, whose opinion the Press expresses, must be much appreciated by the Master; and we think that the less notice one takes of the project the better. It originated in perfidy; let it perish in well-deserved obscurity.

### GAZETARO.

La unua numero de gazeto "Hispana Revuo" aperis en Julio. Ĝi estas esperanta, ilustrita, monata gazeto, publikigita en Madrido. Aboŭprezo: Jare 3.25 frankoj. La ĉef-redaktoro, Sro. J. Perogordo, en la fino de malferma artikolo, "Al la universala publiko," skribas jene:—"Ni havas fidon pri la estonteco, kaj ni kredas ke ĉiu esperantisto ne devas limigi sin proli la lingvon, sed laŭ sia povo li devas utiligi siajn grandajn aŭ malgrandajn fortojn por porti unu ŝtonon al la belega monumento de nia afero.

ESPERANTA ABELO, Itala gazeto:—A. Tellini, Udine, Italujo:—Nur 4-paĝa gazeto, sed havas bildojn kaj landkarton. Oni ne citas la prezon.

INTERNACIA SOCIA REVUO.—Ni ricevis la julian kaj aŭgustan numerojn de ĉi tiu interesa gazeto. Interalie ni precipe rimarkis artikolojn, "La elproprigado de la Poloj," "La ribelo kamparana en Itallando," kiujn ambaŭ estas legindaj, malgraŭ iliaj iom revoluciaj ejoj.

Vendredon, 28a de Aŭgusto, okazis la tria malferma kunveno de la Melburna Klubo en la Furlong—a Muzikĉambro, ĉar la ordinara klubkunveno ne estas sufiĉe vasta, nek havas fortepiano por akompani la kantadon. Mankas al ni detala raporto.

Estis interese, dum la vizito de la amerika ŝiparo, vidi ĉe bufedo melburna du japanajn maristojn interparoladantajn kun amerika nigrula en Esperanto.

## LA MORTO DE PETRONIUS.

(El "Quo Vadis" de H. Sienkiewicz.)

"Karaj amikoj, gajiĝu kaj ne miru. La maljuneco kaj malforteco estas malgajaj kamaradoj en la lastaj jaroj de la vivo, tial mi donos al vi bonan ekzemplon kaj bonan konsilon. Kiel vi vidas, ne estas necese ilin atendi, sed antaŭ ol ili alvenos vi povos foriri memvole kiel mi intencas fari."

"Kia estas via intenco?" kriis multe da voĉoj ĉiutage.

"Mi intencas gajigi, trinki vinon, aŭskulti muzikon, rigardadi ĉi tiujn diajn formojn kiujn vi vidas ĉe mia flanko, kaj tiam ekdormi, kapkronite per floroj. Mi jam adiaŭis Cezaron. Ĉu vi volas aŭskulti kion mi skribis al li kiel adiaŭon?" Li eltiris leteron el sub la purpura kuseno, kaj voĉlegis jene;—"Ho! Cezaro; mi scias ke vi malpacience atendas mian alvenon, kaj ke via fidela kaj amika koro sopiras pri mi tage kaj nokte. Mi scias ke vi deziras surverŝi min per donacoj, nomi min prefekto de viaj pretoriaj gvardistoj, kaj ordoni al Tigellinus ke li fariĝu tio por kio la dioj lin taŭgigis, oficisto de muloj en tiuj viaj landoj kiujn, veninte Domition, vi heredis. Pardonu al mi, mi petas, se nun mi juras al vi per l'Infero, kaj per la fantomoj de via patrino, edzino kaj frato, kaj Seneko kiuj ĉiuj jam estas tie, ke mi ne povas aliri al vi. La vivo estas granda trezoro, mia amato, kaj el tiu trezoro mi sciis elekti la plej karajn juvelojn. Sed, en la vivo ekzistas multe da aferoj kiujn mi ne plu povas toleri. Ne pensu, mi petas, ke miaj sentoj vundiĝis pro tio ke vi mortigis vian patrinon, edzinon kaj fraton, ke vi forbruligis Romon, kaj sendis Erebuson ĉiujn honestulojn de via imperio. Ne, nepo de Kronos, la morto estas la komuna sorto de l'homaro, kaj oni ne povis alie atendi de vi. Sed disŝirigi miajn orelojn dum longaj venontaj jaroj per via kantado, vidi viajn arlekenaĉajn kruerojn tordigitajn en la Pirea danco, aŭskulti vian ludadon, deklamadon kaj poemojn, ho, antaŭ urba versfarantaĉo, estas tro multe por mia forto, kaj naskis en mi deziron morti. Romo ŝtopas la orelojn por eviti vin aŭdi; la mondo ridas vin, kaj

mi nek volas nek povas ruĝiĝi plu por vi. La blekoj de Cerbero, mia amato, kvankam tiuj similas al via kantado, malpli ofendos min, ĉar mi neniam estis ĝia amiko, kaj mi ne devos honti pri ĝi. Adiaŭ, sed ne kantu plu; mortigu, sed ne verku plu poemojn; venenu, sed ne dancu; fariĝu brulkrimulo, sed ne ludu sur la harpo. Tiaj estas la deziroj kaj la lasta amika konsilo kiun sen las al vi la Arbitraciisto de l'Eleganteco."

La festenantoj ekmutiĝis de teruro. Ili scias ke la perdo de l'imperio estus malpli kruela bato por Cezaro; ili ankaŭ sciis ke kiu skribis tiun leteron, tiu devos morti. Samtempe ili ektimegis pro tio, ke ili mem ĉeestis la legadon. Petronius ekridis tiel kore kaj gaje ke ŝajnis kvazau la tuta afero nur estus senkulpa ŝerĉaĵo. Tiam li ĉirkaŭrigardis kaj diris:—"Gajiĝu vi kaj forpelu la timon: neniuj devos konfesi ke li aŭskultis la legadon de la letero. Mi mem fanfaronos pri tio sole al Haron kiam li pramos min trans la riveron. Li kapbalancis al la greka hirurgiisto, kaj atentis la brakon. La lerta greko tuj ĝin ĉirkaŭligis per ora rubando, kaj malfermis vejnon ĉe la kubuta angulo. Elŝprucis la sango sur la kusenon, kaj surverŝis Eŭnicon kiu subtenis la kapon de Petronius. Sin klinante super lin ŝi diris: "Mastro, ĉu vi pensas ke mi volus vin forlasi? Se la dioj donacus al mi seumortecon, kaj Cezaro transdonus al mi la regadon de la tuta mondo, mi ankoraŭ volus akompani vin." Petronius ridetis. Sin levante iomete, li tuŝis ŝiajn lipojn per la siaj, kaj respondis: "Venu do kun mi." Tiam li aldonis: "Vi fidele amis min, mia diulino." Kaj ŝi etendis sian rozkoloran brakon al la hirurgiisto, kaj baldaŭ elfluis ŝia sango kaj kunniksiĝis kun la lia. Li faris signon al la horestro. Denove sonis harpoj kaj voĉoj. Unue oni kantis "Harmodion," poste la kanto de Anakreon, en kiu plendis la poeto ke li trovis sub arbo la frostigitan kaj plorantan idon de Afrodito, ke li enportis tiun, revivigis per varmo, kaj sekigis ĝiajn flugilojn, kaj tiam, ke la sendankuleto redone sage trapikis lian koron, de kiam li tute perdis la trankvilon. . . . Kaj

tiamaniere Petronius ekdormis. Kiam li vekigis la knabina kapo kuŝanta apud li jam fariĝis lilikolora. Li metis ĝin sur la kusenon por fina rigardo. Tiam denove la vejnoj malfermiĝis. Ĉe lia kapbalanco la kantistoj komencis novan kanton de Anakreon, kaj mallaŭte akompanis ĝin la harpoj por ne dronigi la vortojn. Petronius pli kaj pli paliĝis. Kiam fordronis la lastaj tonoj, li turnis sin al la festenantoj ankoraŭ unu fojon, kaj diris:—"Amikoj, konfesu ke kun ni pereas—" sed li ne povis fini. Per lasta movo lia brako ĉirkaŭprenis Eŭricon, falis la kapo sur la kusenon, kaj li spiris sian lastan spiron. Sel la festenantoj rigardante tiujn du blankajn korpojn similantajn du mirindajn statuojn, bone sciis ke kun tiuj jam pereis ĉiu poezio kaj beleco en ilia mondo.

—Tralukis A.E.B., Esp. 16469.

### CIFERA MUZIKO.

En Francujo la "Paris-Chevegalin" instruistaro estas penadinta fari por la infanoj kaj nespertuloj per ciferoj, kion Curwen kaj liaj aligantoj elfaris en Anglujo kaj kelkaj kolonioj per la "Tonic Solfa" litera skribmetodo. En multe da unuagradaj lernejoj oni instruas ĉi tiun ciferan sistemon, kaj la Chevea ĥoro kaj la londona "Tonic Solfa" ĥoro gajnis divide la unuan premion ĉe la granda internacia konkurso de la pariza internacia ekspozicio en 1867, kiam 337 ĥoroj de Germanujo, Svisujo kaj Francujo konkuris. Ĉi tiu sistemo presas la ciferojn sen notoj aŭ 5-linia stafo, sed nomas 1, ut (do); 2, re; 3, mi; k.c. kiel la solfaistoj. Ili devis batali tre energie por la nuna pozicio, ĉar, ne nur estis necese venki la ordinaran muzikistan konservatismon, sed ankaŭ la tute ĝeneralan kutimon en Francujo uzi "ut" por la noto C; "re" por D; kio ajn estas la klefo; (angle, Key) ekz. "Andante en fa"—"Andante in Key F," anstataŭ la "movebla doh," kiu konsideras "doh" ĉiam la toniko (key note), "re," la dua de la gamo (scale); "mi," la tria; k.c. Estas kompreneble ke la entuziasmoj kiuj estas inspiritaj per la ideo de lingvo kiu malfermos nekonatajn vidaĵojn de sciado kaj

informo inter alinaciaj kunuloj, devus esti entuziasmaj pri muzika sistemo kiu kapabligas la malplej instruitajn muzikistojn kanti korekte kaj unuevide; kaj sekve en Britujo oni trovas Tonik-Solfa-istojn interesitajn en Esperanto, kaj verkantajn Tonik-Solfajn muzikajojn; samtempe en Francujo, M. E. Robert, 5 rue Ravignan, Parizo, eldonis esperante libreton pri "Cifera Muziko." Por germanoj, svisoj kaj francoj, kiuj pli-malpli alkitimigis al la ciferoj por montri la gradojn de la gamo, ĉi tiu sistemo povas esti valora, sed por la angleparolantoj, la zorgeme bonegradigate verkita kaj sukcesa Tonik-Solfa litera skribmetodo (notation) kaj instrusistemo troviĝos pli taŭga kaj pli facile komprenebla.

—DRO. S. MCBURNEY.

### BIBLIOGRAFIO.

"Esperantista Kantaro," eldonita de Karl Jost, Zurich. Ĉi tiu kolekto utilas al grupoj kiuj volas diversi la kunsidojn per kantado. Ĝi enhavas 13 kantojn, por kvar voĉoj miksitaj, kaj la arioj estas melodiaj, kvankam la harmonioj ne estas perfektaj. Unu favora punkto estas tio, ke la plimulto estas taŭge aranĝitaj por du-parta kantado.

"CIFERA MUZIKO per Esperanto," de E. Robert:—Ĉi tiu broŝuro ne celas plene instrui pri muziko, nek anstataŭi aliajn sistemojn. Ĝi nur intencas konigi al mezinstruitaj muzikantoj facilan manieron utiligi sian emon kun profito, kaj sen gravaj elspezoj. Per ĝi, oni povas studi eĉ plej malfacilajn muzikajojn, kantotjan ĉu sole, ĉu ope, kiujn oni preparus por propra kontentigo, aŭ por kunvenoj, kongresoj, k.t.p., Prezo, 10 ekz. afrankite—1 frankon. Mendebaj en Parizo, 5 rue Ravignan.

### NOVA GAZETO.

La Gosforda esperanta klubo post ne longe publikigos novan esperantan gazeton, "Verda Stelo." Manskribota, kun allogaj kolorigitaj bildoj, premioj, k.t.p. Ĝi aperos ne regule, sed je nefiksitaj datoj. Prezo po 5 ŝilingoj, por 10 sinsekvaj ekzempleroj. Sin turni al G. Collingridge, Hornsby, N.S.W.



THE

# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 7.      NOVEMBRO, 1908.      PREZO 3 PENCOJ.

## NOVA VORTARO.

La delonge atendita angla-esperanto vortaro de Dro. Josefo Rhodes estas nun ricevebla en Aŭstralio. Ĉiuj anglaj studentoj kiuj deziras pliriĉigi la literaturon de Esperanto per la traduko de anglaj verkoj, bonvenos ĉi tiun bonegan vortaron, kiu cetere faciligos la verkadon de originalaj tezoj. La kompilinto ŝparis neniajn penojn por prezenti la diversajn signifojn de la anglaj vortoj, kaj la plej taŭgan metodon por esprimi tiujn signifojn esperante. Dum ses jaroj Dro. Rhodes sin okupadis je la kompilado de ĉi tiu vortaro, kaj oni povas taksigi ĝin kiel la hodiaŭan modelon por angle parolantaj esperantistoj. Ni rimarkis ke la kompilinto ne nur enhavigis ĉiujn vortojn komune uzatajn nuntempe, sed ankaŭ enkondukis aliajn novajn, la plimulton da kiuj oni povas nomi "fremdaj" t.e. "internaciaj" vortoj; kvankam li mem elpensis kelkajn tute novajn radikojn. Ni estas certaj ke ĉi tiu vortaro fariĝos potenca stimulo al la traduko de anglaj verkoj, kaj verkado de originaloj tezoj; kaj ni kore rekomendas ĉiujn entuziasmulojn mendi ĝin senprokaste.

[Ricevebla ĉe Melville and Mullen, Collins-street, Melbourne. Prezo 6s.]

## ANONCO.

Ankoraŭ unu fojon ni trovas ke necese estas alvoki al tiuj legantoj kiuj regule ricevadis la gazeton, kaj ne ankoraŭ sendis la abonpagojn. El 250 ekzempleroj dissendataj ĉiunmonate, oni abonpagis malpli ol 100, kaj ni insiste petas ke tiuj kiuj ne ŝatas la gazeton bonvolu informi al ni pri tio, kaj ke la ceteraj alsendu iliajn kotizaĵojn senprokaste.

## A NEW DICTIONARY.

The long-expected English-Esperanto dictionary of Dr. Joseph Rhodes is now obtainable in Australia. All English students who desire to enrich the literature of Esperanto by the translation of English works will welcome this excellent dictionary, which will facilitate also the writing of English compositions. The compiler has spared no efforts to set forth the various meanings of the English words, and the most suitable means of expressing these meanings in Esperanto. For six years Dr. Rhodes was occupied in the compilation of this dictionary, and it may be regarded as the present-day standard for English-speaking Esperantists. We notice that the compiler not only includes all the words commonly used at the present time, but has also introduced other new ones, the majority of which can be termed "foreign;" that is, "international" words, although he himself has thought out some completely new roots. We are sure that this dictionary will become a powerful stimulus towards the translation of English works and the writing of original compositions, and we heartily recommend all enthusiasts to order it without delay.

[Obtainable at Melville and Mullen, Collins-street, Melbourne. Price 6s.]

## NOTICE.

Once more we find it necessary to appeal to those readers who have been receiving the gazette regularly, and have not yet sent their subscriptions. Out of the 250 copies distributed each month less than 100 are subscribed for, and we urgently beg that those who do not appreciate the gazette will kindly inform us of the fact, and that the others will send along their subscriptions without delay.

## KORESPONDADO.

Ni ricevis leteron de Sro. Frank E. Wallace (Sydney, N.S.W.) pri la unua artikolo en nia lasta numero, kiu kredeble faras malbonan impreson sur la esperantistaron pro ĝia malvereco. Ni plezure citas el lia letero la jenon:—"Zamenhof ja submetis sian lingvon sub la direkto de la Lingvo Komitato; sed tiu korporacio neniel rilatas al la Delegacio kiu celis la elekton de helpa lingvo. La Delegacio elektis Esperanton, sed trouzis siajn rajtojn aldonante, 'kun la modifajoj proponitaj de 'Ido.' 'Estis ĉe tiu Delegacio ke Sro. de Beaufront reprezentis Zamenhof-on kaj la esperantistaron, ne malkaŝinte la fakton ke li estas 'Ido.' La Lingvo Komitato siaparte malakceptis 'Idon,' kaj fidele sin tenas al la Bulojna Deklaracio." La artikolo suprealudita estis trompema por la plimulto, ĉar ĝi intermiksas la Delagacion kun la Lingvo Komitato. Grava eraro! Ni kore dankas Sron. Wallace pro lia rimarkigo de tiu bedaŭrinda erarego.

Sro. Cedric White skribas:—Karaj samideanoj; dum la vojaĝo sur la bona ŝipo Suevic, mi serĉis samideanojn ĉe ĉiu haveno. En Hobarto, Tasmanujo estas kelkaj entuziasmoj kaj ankaŭ klubo. Mi renkontis sep gesamideanojn, kaj kvankam la klubo ne kunvenis dum la somero, S. Harcourt, la sekretario esperis ke la intereso sufiĉe pligrandiĝis en la sekva vintro por ebligi la daŭrigadon de la kursoj. Sro. Hermann Ritz, lingva profesoro ĉe la Universtato estis studinta Esperanton antaŭ 18 jaroj! Li montris al mi ĵurnalojn de 1900. Lastan jaron li donis premion por Esperanta Konkurso, sed la estraro de l'universitato ne plu permesis ke li instruu nian karan lingvon, eĉ senpage. Ŝunu mia kunvojaĝanto, Sro. Clemes kiu havas grandan lernejon en Hobarto, tute ne interesiĝis kiam la klubo sur la ŝipo fondiĝis, sed li baldaŭ tre multe interesiĝis, kaj faris pli da progreso ol la aliaj klubanoj. Sro. Clemes intencas fervore propagandi post sia reveno, kaj Frino. Ross kiu ankaŭ estas intruistino sendube helpos al li. Mi devas danki la Hobartajn amikojn pro ilia gaste-meco. Ĉe Durbano, Sud-Afriko, ami konpreneble serĉis Esperantan

Klubon, kaj estante Brita, mi demandis policanon, kiu respondis, "jes, mi konas Esperanton, iomete; unu el la policanoj estas Esperantisto." Poste mi vizitis Sro. Kornel ĉe la policejo, kaj li tre afable montris al mi la vidindaĵojn, kaj ankaŭ prezentis min al Sro. Dusart, prezidanto kaj instruisto ĉe la Durbana Esperantista Klubo. Bedaŭrinde estis publika libertago, sekve mi ne povis renkonti la aliajn klubanojn.

Sro. F. Stepanek, Karkin 241, Bohemujo, Aŭstrujo, Eŭropo, deziras korespondadi kun gesamideanoj per ilustritaj poŝtkartoj. Li petas glui poŝtmarkojn sur bildflanko. Li sendas aŭstriaĵajn jubilaĵajn, aŭ alilandajn poŝtmarkojn per esperantaj gazetoj. Ankaŭ li interŝanĝas gazetojn, libretojn kaj ĵurnalojn esperantajjn aŭ bohemiajn je francaj, rusaj.

Rev. W. D. Kennedy, Tumut, N.S.W., skribas:—"Mi vizitis Junee-n je la unua de Septembro, kaj faris paroladon pri Esperanto al la gelernantoj de la loka ŝtatlernejo. La geknaboj estis treege interesataj, kaj kelkaj el ili de tiu tempo sendis al mi pri lernlibroj. Antaŭen Esperanto! Fraŭlino Donaldson, nova aniĝintino de la ĉiticia klubo, sendas la jenon:—

Kelkaj fraŭlinoj je ĉiu mardnokto, Havas plej eble la grandan humoron; Ili ridegas kaj krias per voĉo Kies gajeco junigus la koron.

Sed ne ridado nur estas farata, Vero devigas min ankaŭ eldiri, Ili lernadas la lingvon plej karan, Tiu ĉi fakto malhelpas nin miri!

Bona proveto, sed ni rekomendas al novaj gesperantistoj ke ili ekzercu sin komence ĉe la prozaĵoj antaŭ ol ekprovi la poezian verkadon. (Redaktoro.)

Ni ricevis la malferman numeron de "La Aŭstralia Verda Stelo, Skizlibro de Geo. Collingridge, Hornsby, N.S.W. Ĝi enhavas 24 paĝojn manskribitajn kaj beletan akvarelon "Brisbane Water." Ni bedaŭras ke la verkinto ne ankoraŭ ellernis la regulojn de la esperanta gramatiko, kaj tre ofte uzas la akuzativon malprave. Sed ni gratulas Sron. Collingridge pro lia laŭdinda proveto, kaj deziras al la skizlibro daŭran sukceson.

## VEKIĜO DE L'NATURO.

[Originale verkita de W. Service.]

Neprizorgeme kiel fortulo kiu amas provadi sian forton, la Naturo kreas kaj pereigas. Bonhumore ĝi preterpasas; la kamparo ridctas permatura greno; gaje la homoj rikoltas, revante pri oro kaj ĝuado. La frunton sulkigante ĝi preterpasas; jen plendo, malsato kaj morto! Sed eĉ fortulon subigas malforto. La Naturo laciĝas kaj ekdormas. Printempo! Vekiĝas la Naturo, refreŝigita, radiantia. Belan sonĝon ĝi havis, kvankam jam forgesitan. Tamen postrestas unu vorto, kaj ĉi tiu vorto sufiĉas, nome "Espero." Ĝin la Naturo murmuris al la kreskaĵoj, kaj kuraje ili elmetas florojn mirinde belajn, enhavantajn la promeson de revigo kaj juneco. Gojege ek-kantas la birdoj. Tiujn ankaŭ kuragiĝis l'Espero, kaj la etaj koroj ŝveliĝas pro kontentiĝo. Ĝin aŭskultas la homoj. Antaŭ la okuloj malvolviĝas ĉies plej karaj deziroj; la efektivigontaj planoj elpensigas: la celoj trafigas. Malantaŭe, neatentite sin trovas la malfeliĉaĵoj, la ĉagrenoj, ĉiuj mizeroj de la vivo. La antaŭtimoj tute foriĝas. La Espero ĉion superregas. Pri la plenumado? Ne esploru! De kiam la mondo komenciĝis, la Scio kuniĝas ĉiam kun la Bedaŭro.

## LA KVARA EN DRESDENO.

[Aŭg. 16-22, 1908.]

La unuan raporton pri ĉi tiu sukcesega kongreso ni trovas en la septembra numero de "The British Esperantist." La malferma parolado de la Majstro troviĝas plene raportita, kaj ni esperas ke ĉiuj fervoraj esperantistoj ĝin nepre legos. La kvara estis rimarkinda en tio ke en ĝi partoprenis pli multe da oficiala reprezentantoj de ekster-esperantaj aferoj ol en antaŭaj kongresoj. Preskaŭ 35 registaroj sendis reprezentantojn, kaj la plej alta entuziasmo distingis la tutan feston. Oni decidis ke la venonta Kvina kongreso okazos samtempe en Barcelono kaj apud Nov.-Jorko.

## AVENTURO DE ĈASISTO.

Ni ĉasadis apud la Verda Rivero, malfrue en aŭtuno, kaj malfeliĉe perdis la vojon. Ekneĝis, kaj ni tre ĝojis povi pasigi la nokton en izola ŝtippedometo ĉe la malsupro de la montaro "Gros Ventres." Josefo Hurt la dommastro, longhara, felvestita ĉasisto kaj lia edzino regaligis nin gastame. Li estis atleta, fortika viro, kun la firma vango kaj forta brako de modela landlimulo. Lia edzino estis blondhara, beleta virino, mezaĝa kaj kvietita. Ni aldonis al la manĝaĵoj freŝan ĉasajon, kaj post bonega manĝo ni ĉirkaŭsidis la lignan fajron, ekbruligis pipojn, kuiris viskipunĉon, kaj interŝanĝis anekdotojn kun nia gastiganto. Mi rimarkis ke mankis al Joĉjo kvar fingroj ĉe la maldekstra mano, kaj okaza rimarkigo pri Kristnaska neĝo kaj frostvundoj elvokis la jenan anekdoton. Ĝi estis la Kristnaska rakonto de Joĉjo Hurt. "Jes, sinjoro," diris Joĉjo, "mi perdis tiujn kvar fingrojn, antaŭ dudek jaroj, je Kristnasko, kaj Sarnjo kaj mi neverŝajne tion forgesos." Sarnjo sidante kviete en la angulo, kapbalancis. "Mi estis forkurinta el Kasparo kun ĉitiea Sarnjo, tiel bela knabino kiel sin trovis en Wyoming (Sarnjo rugiĝis) kaj ŝia patro, maljuna Roberts ekmalamis min pro tio. Li juris pafi min ĉe vido, la viron kiu rabis al li filinon. Mi ne deziris malpacon kun mia bopatro, tial ni foriris el Karltono. Mi konstruis dometon en la densa verda arbaro supre en la Tetono, riskis frostan vintron, kaj komencis meti kaptilojn. Tri tagojn antaŭ nia unua Kristnasko, mi malsupreniris sur glitŝuoj al "Jackson's Hole," vendis felojn, kaj revenis kun glitveturilo ŝargita per Kristnaskaj necesajoj, kaj ankaŭ bubalfela mantelo por la edzino. Antaŭ-kristnaskon mi trenis la glitveturilon sur la malmola krusto, duonmejlon malproksime de la dometo, kiam mi decidis flankeniri por serĉi malnovan urskaptilon kiun mi lasis ordigitan ĉe supro de ursvoĵeto. La ursoj ĉiuj jam ennestiĝis, kaj mi intencis reporti la kaptilon pretan je la proksima printempo. Nu," li daŭrigis, "tiu kaptilo estis unu el la plej bonaj, kaj konstruita

por teni la plej grandan specon de ursoj. Mi baldaŭ trovis la lokon signitan per altkreska malviva pinarbo. Kompreneble la kaptilo estis neĝkovrita. Nenio apudestis de kiam mi ĝin vidis antaŭ du monatoj, ĵus antaŭ ol falis la unua neĝo, kaj tial, ĉar ĝi kredeble estis ankoraŭ ordigita, mi tre singardeme forŝovelis la neĝon. Baldaŭ mi trovis la 20-futajn ŝtipegon al kiu la kaptilo estis alĉenita, kaj palpe serĉis la ĉenon, kiam ekfaletis mia piedo sur la ŝtipego. Mi falis antaŭen, eljetis manon por savi min kaj—ĝin metis rekte malsupren tra la neĝo sur la plataĵon de la kaptilo. Feliĉe la neĝo malhelpis ĝin fermiĝi tro rapide, kaj la deutaro de la kaptilo ankaŭ suprenjetis mian brakon, sed antaŭ kia mmi tute eligis la manon, la dentegoj kuniĝis ĉe miaj kvar fingroj, kaj tenis min firme. Nu, sinjoro, mi ne povos forĝesi la sekvintan duonhoron dum mi vivados. La termometro montris subnulan malvarmegon. Jen mi trovis min tenatan per 40-funta urskaptilo alĉenata al 20-futa ŝtipego. Duonmejlion malproksime estis la edzino tiame nur knabino, atendante ke mi reiros hejmen kun la Kristnaska nutraĵo. Mi ne havis iajn iloĵn por malpremigi la risortojn kaj malfermi la kaptilon. Mi ne povis eĉ atingi la glitveturilon, malproksime je 20 futoj, por havigi nutraĵon aŭ trinkaĵon. La sola ilo ĉe mi estis akra tranĉilo ĉe la zono. Necese estis zorgi pripensi, antaŭ ol decidi kion fari, sed estis devige. Tial post kelkatempo mi eltiris la tranĉilon, kunpremis la dentojn, kaj tion faris.” “Kion faris?” mi diris nevole, kvankam mi jam divenis kio sekvos. La Naturo ne donis al Joĉjo tiun kuraĝan vizaĝon kaj tiujn klarajn decidemajn okulojn pro nenio. “Dehakis la kvar fingrojn ĉe la dua artikio,” Joĉjo kviete respondis. “Bonŝance la artikoj estis ĝuste liberaj de la kaptilo; mi pensas ke mi svenis post tio.” Sarnjo levigis, kaj metis la manon sur la ŝultron de sia edzo, kiam li daŭrigis: “Ne estas plu por rakonti. Mi baldaŭ rekonsciigis, trovis min denove liberulo, englutis trinkaĵon da vis kio el la glitveturilo, bandaĝis la manon—bonŝance la maldekstran—per mia koltuko, kaj post duon-horo min trovis hejme kun Sarnjo.

Ni ĝuis la Kristnaskan tagmanĝon la morgaŭan tagon, sed mia maljunulino diras ke kiam mi denove kunmiksiĝos kun urskaptilo en la profunda neĝo, ŝi devos akompani min kun hakilo por ke mi ne difektu alian bonan tranĉilon.”

El “Pearson's Magazine.”  
Tradukis Esp. 16476.

## LA OVO DE KOLUMBO.

La kardinalo Mendoza aranĝis por Kolumbo grandan festenon kaj diris al li ĉe la tablo laŭdan paroladon. Li nomis lian eltrovon plej granda venko de la homa saĝo. Multaj korteganoj, sidantaj ĉe la tablo, aŭskultis la laŭdojn kun malplezuro. “Sajnas al mi—diris unu el ili—ke ne malfacile estis trovi la vojon.” “Mi neniam pensis, ke tio estas ia merito—respondis Kolumbo—kaj mi nur dankas la Ĉielon, ke ĝi elektis min por ĉi tiu eltrovo.”

Kiam la gastoj daŭrigis la disputadon, ĉu facile aŭ malfacile estis fari ĉi tiun eltrovon, Kolumbo starigis, prenis ovon kaj diris: “Kiu el vi povas starigi ĉi tiun ovon tiel, ke ĝi ne falu?” Ĉiuj gastoj volis montri sian lertecon, sed neniu sukcesis starigi la ovon. —“Donu mi petas, la ovon al mi!”—diris Kolumbo. Li prenis ĝin, ekfrapis ĝin ĉelikate al la tablo kaj la ovo starigis sur la rompita loko. “Ah—ekkriis la gastoj—tion sciis fari ĉiu el ni!” —“Kial do respondis Kolumbo ridetante—vi tion ne faris? La diferenco inter ni estas jena: vi povus tion fari, kaj mi faris.” Tia estas la deveno de la proverbo: La ovo de Kolumbo.

---DRO. KABE.

## EDZECA VORTREBATO!

La Edzo: “Kiam vi lernos ke razilo ne estas difinita por akriĝi kraĵojn?”

La Edzino: “Kiam vi lernos ke harpinglo ne estas difinita por purigi pipojn.”

Printed and published by R. Dossor, for the Benalla Esperanto Club, Bridge Street, Benalla, in the State of Victoria.

# Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 8. DECEMBRO, 1908. PREZO 3 PENCOJ.

## KONSILA VORTO.

Ĉiuj fidelaj esperantistoj estas entuziasmaj; tamen se oni loĝadas en urbo kie ankoraŭ ne ekzistas esperanta klubo aŭ grupo, la komenca entuziasmo grade emas malvarmiĝi. Same kiel du varmaj substancoj povas konservi kaj eĉ pliiĝi sian varmecon per reciproka frotado, tiel ankaŭ la ofta interrilato inter esperantistoj konservas kaj pliiĝas ilian entuziasmon. Se bedaŭrinde iu samŝano sin trovas izola, kaj ke neeble estas vekti intereson pri la lingvo inter siaj proksimuloj, (kio, flanke, tre malofte okazas) tiu devus aboni kiel eble plej multe da esperantaj gazetoj, kaj ankaŭ obteni bonan provizon la esperanta literaturo. La gazetoj informos al li pri la tutmondaj progresoj farataj de la lingvo, kaj se li cetere korespondadas kun saĝaj—kaj alilandaj samideanoj, tio revivigos lian antaŭan entuziasmon pri la afero. La legado de plejbonstila literaturo baldaŭ stimulos lin provi tradukojn, kaj nun, kiam ni havas aŭstralian gazeton esperantan, li povos vidi presitaj siajn unuajn verkaĵojn. Sed ĉiu esperantisto senlaciĝe laboradu en sia propra ĉirkaŭaĵo. Neniam preterlasu okazon por enkonduki la temon de helpa lingvo. Sciigu almenaŭ al ĉiuj najbaroj pri la rapidaj progresoj kiujn faradas la lingvo, kaj ĝia tutmonda utileco, kaj tre kredible la fondiĝo de grupo baldaŭ rezultos. De tiam via progresado similos tiu de ruliĝanta neĝbulo, kiu ĉiame pligrandiĝadas.

Kiam vi pagos al mi la kvin ŝilingojn, kiujn vi ŝuldas al mi?

—Ne estas kvin, ili estas dek, diras la ŝuldanto.

—Vj eraras, mi nur pruntedonis al vi kvin ŝilingojn.

—Ho! Mi preferas ŝuldi al vi dek ŝilingojn, ol pagi al vi kvin.

## A WORD OF ADVICE.

All true Esperantists are enthusiastic; nevertheless if one resides in a town where there does not yet exist an Esperanto Club or Group, the initial enthusiasm tends gradually to cool. Just as two warm bodies can retain, and even increase their warmth by mutual friction, so also the frequent intercommunication between Esperantists preserves and increases their enthusiasm. If unfortunately any comrade finds himself isolated, and it is impossible to arouse an interest in the language among his neighbours, (which, by the way, very seldom occurs) he should subscribe to as many Esperanto journals as possible, and also procure a good supply of Esperanto literature. The journals will inform him about the universal progress made by the language, and if he also corresponds with comrades of his own and other countries, it will revive his previous enthusiasm concerning the affair. The reading of literature in the best style will soon stimulate him to attempt translations, and now that we have an Australian Esperanto journal, he can see his first writings in print. But let every Esperantist labour unwearingly in his own neighbourhood. Never lose an opportunity of introducing the subject of an auxiliary language. At least make known to all the neighbours about the rapid progress which the language is making, and its universal utility, and very probably the formation of a group will be the speedy result. From that time your progress will resemble that of a rolling snowball, which constantly increases in size.

## NOTICE.

All communications to be addressed to the Editor, Dr. A. E. Barrington, Benalla, Victoria, Australia.

## PRI MIA EKSKURSO.

de MAY D. HARRISON.

Kelkaj geamikoj petis ke mi iom skribu pri mia lasta ekskurso, kvankam mi timas ke ĝi ne estos tre interesa historio. Mi estis tre malsana, kaj vojaĝis por resaniĝi. Mi troviĝis en Sydneyo dum la vizito de la amerika ŝiparo. (bedaŭrinde). Belega spektaklo estis la ŝiparo en la haveno, sed mi ne ŝatis la amasojn sur la stratoj. Restinte tie nur du tagojn mi vojaĝis Brisbanon kie mi restis dek tagojn, sed, ĉar mi plimal saniĝis tie, mi forveturis al " Tweed Heads " N. S. W., tre beleta marborda urbeto. Ĉarmegaj estis la vidaĵoj, la maro ĉe unu flanko kaj la montoj ĉe la alia. Mi baldaŭ resaniĝis, promenis sur la marbordo, suprenrampis la montojn, kaj estis tre feliĉa, escepte pro nostalgio. Sur unu monto, " Razila Dorso," mi devis transiri pli ol dek futojn da vojo kiu konsistis el akraj ŝtonoj kaj havis nur unu futon da larĝo, kaj ĉe ambaŭ flankoj estis profundegajo tiel ke se mi falus, mi falus 400 aŭ 500 futojn. Mi tre timis, kaj petis mian amikon ke ni revenu, aŭ ke li permesu al mi rampi, sed ne; li helpis min per manoj kaj kuraĝigaj vortoj, kaj mi save transiris la danĝeran lokon kaj tuj ekvidis ĉarmegan pejzaĝon. La monto estas tute plata kiel la planko en domo, kaj apenaŭ havas 200 futojn kvadratajn da areo ĉe la supro. Unuflanke vi liĝas grandaj montoj, aliflanke la rivero " Tweed " serpentumas tra la valoj, kaj plej malproksime oni povas vidi la belegan maron kun ondegaj rompiĝantaj sur la ŝtonegoj. Inter " Razila Dorso " kaj la aliaj montoj sin trovas sukerkanejoj, belegaj arboj kaj ĉiukoloraj kaj ĉiuspecaj rampakreskaĵoj, sed eĉ ĉi tiu Edeno havas siajn serpentojn. Mi vidis unu sur la vojeto, sed ĝi ŝajne estis pli timema ol mi, kaj forrampis rapide. Kiam mi revenis al la hotelo, mi eksentis kvazaŭ pinglo piketas al mi la kolon, kaj mi palpe almetis la manon por eltiri ĝin; sed, anstataŭ pinglo mi trovis malgrandan insekton. Kiam post peno mi sukcesis eltiri ĝin, mi demandis la hotelistinon kia insekto ĝi estas, kaj ŝi diris ke ĝi estas iksodo (tick). Mia kolo baldaŭ fariĝis tre ŝvelaĵa kaj dolora. Mi ofte legis pri

iksodoj sur ŝafoj kaj bovoj, sed tio ne interesis min, sed de nun mi devos ilin simpatii. En la regiono inter Queenslando kaj Nova Sud-Kimrujo oni konstruis du paliserojn kaj vojon, kaj ne permesas al bestaro transpasi la vojou antaŭ ol esti subakvigita por detruiri la parizitajn insektojn. Mi miras ke oni ne insistis subakvigi min.

Daŭrigota.

## KORESPONDADO.

Kara Redaktoro,

Antaŭ kelkaj monatoj mi sugestis ke la esperantistaro pentu starigi kunventablojn ĉe unu-du restoracioj aŭ Te-Gardenoj en Melbourne kie samideanoj povus renkonti sin reciproke, ĉu konatoj aŭ ne. Mi pensis ke la posedantoj permesus la elmontron de granda verdo stelo kun la vortoj. —

ESPERANTO, LINGVO  
INTERNACIA.

Raporto de eŭropa gazeto ĵus ricevita diras ke oni jam starigis tiajn tablojn en kelkaj urboj, sed la plej grava punkto estas ke kelkaj samideanoj interkonsentu ĉeesti je difinita tago kaj horo semajne. Ĉu ne estas gejunuloj kiuj ĉiutage tag—aŭ vespermangas eksterdome en la pligrandaj urboj de Aŭstralio, kaj kiuj plezure uzus la okazon por renkonti aliajn kaj interparoladi? Tio ne nur estus bona afero por la partoprenantoj, kaj kunvenejo por vizitantoj, sed ankaŭ senintermanka praktika reklamo por la Lingvo Internacia.

Via, Esp. 17885.

DU NOVAJ ESPERANTAJ  
KANTOJ.

Ni deziras turni la atenton de la esperantistaro al du ĉarmaj novaj kantoj de Dro. S. M' Burney. Unu estas kvarvoĉa kanto " Esperanta Lando," kies tekston niaj legantoj ankoraŭ vidis en ĉi tiuj kolonoj. La alia " Mi aŭ las vin " estas vere ĉefverko kun angla kaj esperanta teksto, taŭga por mezosoprana aŭ baritona voĉo. Ni kore rekomendas ambaŭ al la muzikantoj inter niaj samideanoj. Prezroj 4 pencoj kaj 1ŝ. 6p.; ĉe Dro. M' Burney, 2 Alfred Square, St. Kilda.

## ATENDANTE LA ŜIPON.

En interspaco de unuhora rajlo de la Plaza staras alta krutaĵo, sur kies rokplena marbordo la oceano senĉese rompiĝas. Sur la sablajo sin trovas kelke da dometoj kiuj ŝajnas antaŭ ne longe eljetitaj de la ondegoj. La kulturejo post ĉiu loĝejo estas enbarita per bambuoj, rompitaĵ spartoj kaj flosaĵo. Kun siaj malmulte da verdaj brasikoj kaj napfolioj, ĉiu ĝardeno iom similas al akvario kiam la akvo estas malflugita. Fakte, ne estus surprize renkonti s renviro fosantan inter la terpomoj, aŭ sironon apude melkantan rosmarinon. Proksime de ĉi tiu loko antaŭe staris granda semafora telegrafa oficejo kun timigaj brakoj elstarantaj kontraŭ la horizonto. Oni jam anstataŭigis ĝin per observejo kunigita per elektra nervo kun la koro de la komerca urbego. De ĉi tiu loko la albordiĝantaj ŝipoj estas signalataj kaj poste kontrolataj en la Urba Borso. Kaj dum ni sidas ĉi tie serĉante la atendatan vaporŝipon, permesu ke mi diru al vi rakonton.

Antaŭ ne longe simplanima laborema ministro, per diligenta laborado en la minejoj amasigis sufiĉe da mono por venigi el hejmo sian edzinon kaj du infanojn. Li alvenis San-Franciskon unu monaton antaŭ kiam alvenos la ŝipo, ĉar li estis okcidentulo kaj vojaĝis surtere, kaj malmulte sciis pri ŝipoj, maregoj aŭ ventegoj. Li obtenis oficon en la urbego, sed kiam alproksimiĝis la dato, li ĉiutage regule vizitis la ŝipoficejon. Pasis unu monato, sed la ŝipo ne ankoraŭ alvenis; tiam monato kaj semajno, du semajnoj, tri semajnoj, du monatoj kaj fine jaro. La malglata pacienca vizaĝo kiu fariĝis ĉiutaga aperaĵo ĉe la ŝipagentejo tiam malaperis. Ĝi reaperis unu posttagmezon ĉe la observejo ĝuste kiam la subiranta suno maldeĵorigis la observiston. Estis io tiel infankora kaj simpla en la malmultaj demandoj faritaj de ĉi tiu fremdulo pri sia afero, ke la observisto kelktempe daŭrigis la klarigon. Kiam estis klarigita la mistero pri la signaloj kaj telegrafajoj, la fremdulo ankoraŭ faris unu demandon. "Kiom da tempo povus foresti ŝipo antaŭ kiam oni ĉesus ĝin atendi?" La observisto ne povas diri; tio dependus de

cirkonstancoj. "Ĉu estus unu jaro?" "Jes, eble unu jaro; kaj oni jam malesperis pri ŝipoj dum du jaroj, kaj tiam fine ili hejneniris." La fremdulo tuŝetis per sia malglata mano tiun de la observisto, dankis ĉi tiun pro lia komplezo kaj foriris. La ŝipo ankoraŭ ne revenis. Rapidaj velŝipoj ennaĝis en la Pordegon, kaj komercaj ŝipoj preternaĝis kun flugantaj flagoj, kaj la saluta pafiligo de vaporŝipoj ofte resonis inter la montetoj. Tiam oni regule renkontis la pacienca vizaĝon kun la malnova rezignema mieno, sed kun pli hela, dezirema elrigardo, sur la homplena ferdeko de la vaporŝipo kiam ĝi elŝarĝigis sian vivan ŝarĝon. Li eble havis malprecizan esperon ke la forestantoj ankoraŭ iel alvenos; sed li interparoladis kun ŝipestroj kaj maristoj, kaj fine mankis eĉ ĉi tiu lasta espero. Kiam la zorglaca vizaĝo prezentigis denove ĉe la observejo, la tre okupa observisto ne povis malŝpari tempon por respondi malsaĝajn demandojn, kaj la fremdulo foriris. Sed kiam eknoktigis li lokis sin sur la ŝtonegoj kun la vizaĝo turnita maren, kaj sidadis tie dum la tuta nokto. Kiam li fariĝis neresanigeble freneza, ĉar tio klarigis la okulhelecon, kiel diris la kuracistoj, flegis lin kunmetiisto kiu konis liajn malfeliciojn. Oni permesis al li eliri nokte por serĉadi la ankoraŭ atendatan ŝipon. Li jam decidis ke tiu albordiĝos en la nokto. Tio, kiel ankaŭ la ideo ke li helpas al la observisto kiu devas laciĝi pro tuttaga observado, ŝajnis plaĉi al li. Tial ĉiunokte li eliris kaj anstataŭis la observiston. Dum du jaroj ŝipoj iris kaj revenis. Li adiaŭis la eliranta velŝipon, kaj ĝin salutis ĉe ĝia reveno. Nur malmulte da loĝantoj konis lin. Kiam fine oni retrovis lin en la kutima loko, pasis unu-du tagoj antaŭ kiam fariĝis ia suspekto. Unu dimanĉon aro da turistoj kiuj grimpis sur la ŝtonegoj, ekaŭdis bojadon de hundo kiu antaŭkuris ilin. Kiam ili aliris ili trovis neluksevestitan viron kuŝantan tie malviva. Oni trovis en liaj poŝoj kelke da paperfolioj—ĉefe paragrafoj eltranĉitaj el diversaj ĵurnaloj pri maraj aferoj—kaj lia vizaĝo turniĝis al la malproksima maro.

de BRET HARTE.

Trad. Esp. 16479.

EL "ESPERO PACIFISTA."  
(Julio).

La Japana Societo de Paco kaj la Japana Esperantista Asocio montris la parencecon de Esperanto kun Pacifismo, delegante samtempe D-ron Kroita, profesoron en la Universitato de Tokio, al la Esperantista Kongreso en Dresden kaj al la Kongreso de Paco en Londono. En tiu lasta Kongreso, nia samideano, kiu estos la unua Japano partopreninto en Kongreso de Paco, intencas paroli nur esperante, kaj deklari, ke nur nia lingvo ebligis la riprezenton de lia lando ĉe tia Kongreso. Ni esperu, ke la blank-rasuloj komprenos tiun lecionon el Ekstrema Oriento!

SILVIO.

tradukita el Shakspeare de W. W. Mann. Muziko de Schubert.

Jen Silvio;—kial ŝi  
De ĉiu hom' ; laŭdata?  
En sauktec' vividas ŝi  
Ĉiele favorata :  
Ŝin adoru tial ni. (bis)

Ĉu amemon havas ŝi,  
Krom sia belegeco?  
Jes,—ĉar dolĉa amradi'  
Vidiĝas, kaj fideco—  
En okulo de Silvi' (bis)

Pro Silvio laŭdkantad'  
Sonadu sur la tero!  
Ŝi vivadu en ĝojad'  
Ĉiame sen mizero ;  
Sen doloro—per benad'. (bis)

GAZETARO.

Ĵus ricevitaĵ, "La Verda Standardo," organo de la hungara esperantista societo kaj de la adriatika ligo esperantista. "Tra la Filatelio," internacia monata organo de ĉiuj kolektistoj de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. La Oktobra numero de "Pola Esperantisto" kiu konservas sian bonstilecon. "Esperanta Internacia Revuo," Industria, komerca, eksporta, filatelio, reklama, kaj literatura gazeto. Domaĝo estas ke la administracio ne posedas supersignitajn preslitterojn. "Polica Revuo," monato organo de esperantistaj policistoj. Redakcio, Budapeŝt, de kiu urbo ni ankaŭ ricevis

du specimenojn de Esperanta Universala Biblioteko, "Persaj Skizoj" kaj "Aĵatur" armena fabelo.

THE WARBURTON ESPERANTO CLUB.

The secretary, Miss L. A. Ward, reports as follows:—"The Club continues to flourish. Last Wednesday week (18th) we gave a social in the Hall, and there were about 80 present. It was a 'Salmagundy' evening, and our little green star showed to advantage on the scoring cards. A banner bearing the green star, and the following:—'W.E.K. kore bonvenas siajn amikojn,' was much admired. The 'Nia Landu' was sung by the choir, and quite a number of the guests decided on learning the language."

ANIAJ RIMEDOJ.

Ne per bruado, per perforto, per perfida mona subaĉeto, per trompo, sed per sia beleco, per sia propra valoro, Esperanto, tiel malbone armita por la batalo, timplene kaj senskue akiris la mondon. Lingvo, kiu per tiaj rime loj sukcesis, ne estas plu detruenda, eĉ se kontraŭ ĝi amasiĝus ĉiuj trezoroj de la mondo.

CARLO BOURLET.

ANONCOJ.

Deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, kaj poŝtmarkojn. Sro. N. Parkeviĉ, Rusujo, Minsk gub. Provodnaja str. d. 10. Sro. T. Shkabara, Rusujo, S—Peterburgo. Nikolajevskaja 33, loĝ. 27. Ĉiam tuj respondos.

Ne tiu estas bona esperantisto, kiu bone esperas, sed tiu, kiu ebligas bonan esperon.

\* \* \*

Malsaĝulo, scianta ke li estas malsaĝa, estas almenaŭ en tiu ĉi rilato sciulo. Sed malsaĝulo, opinianta sin sciulo, estas nome tiu, pri kiu oni diras "li estas malsaĝa."

Printed and published by J. H. Elshaug, for the Benalla Esperanto Club, Bridge St., Benalla, in the State of Victoria.